EPOSOJ EL ANTIKVA UGARITO

Baal kaj Anat
Krt
Aqht

Tradukita el la Ugarita
de
Donald Broadribb

Eposoj el Antikva Ugarito: Baal kaj Anat, Krt, Aqht
Tradukita el la Ugarita al Esperanto de Broadribb, Donald (Donald Richard), 1933-
Unue eldonita kiel *Tri Mitoj el Ugarito: Baal kaj Anat - Krt - Aqht* en *Biblia Revuo*, vol. VII, n. 4 (Okt-Dec 1971), p. 181-243.
Eldonita kun korektoj kaj revizitoj de Bookleaf Publishing, 1995. ISBN 1-876042-00-1.
Ĉi tiu ret-eldono: aŭgusto 2000.
Vidu http://www.poboxes.com/bookleaf/

69 p. : ill. ; 21 cm.
892.6

Enhavo

Enkonduko

En 1929 oni komencis elfosi la gravan arkeologian siton de la antikva urbo Ugarito (nun nomata Ras-es-Ŝamra), iam grava haveno, sur la nordorienta bordo de la Mediteranea Maro, tuj sude de Turkio. De 1929 oni trovadas grandan kvanton da surskribitaj argilaj tabuletoj, plejparte faritaj ĉ. 1500 a.K., dum la lasta florado de Ugarito antaŭ ol ĝi estis detruita de la Marpopoloj[1] ĉ. 1200 a.K. Ni nun scias, pro konstanta arkeologia laborado ĉe tiu sito, ke Ugarito estis unu el la plej antikvaj urboj de la regiono, kaj ke dum pluraj jarmiloj ĝi estis centro de kulturo en tiu parto de la Proksima Oriento. Arkeologia elfosado atingis urbnivelojn de proks. 7000 a.K., kaj la origino de la urbo ankoraŭ ne estas atingita.


Ĉi tiu urbo restas ankoraŭ nun la sola urbo en la Sirio-Palestina regiono el kiu venis abunda literatura materialo el tiu antaŭ-Israela epoko, rezulte de arkeologiaj fosadoj. Pro tio, ĝia graveco por la antikva historio estas nesuperebla. Iom pli ol 500 skribitaj tekstoj estas nun haveblaj en presita formo en la Ugarita lingvo, plejparte administraciaj arkivaĵoj. Tamen, pluraj el la tekstoj estas literaturaj. Nur tri estas bone deĉifreblaj: la granda eposo pri Baal kaj Anat, kaj la eposoj pri Krt kaj Aqht. Plej elstara inter tiuj tri estas la unua, ĉar ĝi prezentas al ni tekston aluditan multfoje ne nur en la Biblio sed ankaŭ en alia klasika literaturo; ĝi estis la originalo de la Grekigita mito pri Adonis.

La lingvo de Ugarito estis Semida dialekto tre parenca al la klasika Hebrea lingvo; malgraŭ kelkaj senrespondecaj pretendoj de fervoruloj, ĝiaj gramatiko kaj vortaro estas sufiĉe malsimilaj al tiuj de la Hebrea por indiki ke temas pri parenca lingvo kaj ne nur varianta dialekto de la Hebrea. La trovitaj tekstoj estis plejparte skribitaj en la Ugarita lingvo, kvankam kelkaj estis en la Akada lingvo. Unue oni ne povis legi la alfabeton sur la Ugaritaj argilaj tabuletoj. Tamen ne multajn monatojn post la unua publikigo de la tekstoj, lingvistoj sukcesis deĉifri la alfabeton. Post la Dua Mondmilito oni trovis lernejan argiltabuleton uzitan en Ugarito, sur kiu estis transskribo de la Ugarita alfabeto per Akadaj literoj, kio montris la ĝustecon de la deĉifrado jam farita de la arkeologoj/ lingvistoj.

La Ugarita alfabeto malsimilis al la aliaj skribsistemoj trovitaj en tiu regiono. Ĉu ĝi estis bazita sur la hieroglifa sistemo Egipta, kiel la

[1] En la Biblio ĉi tiuj invadintoj nomiĝis Filiŝtoj.

praformoj de la Hebrea alfabeto, estas dube. Tamen, la ordo de literoj estis simila al tiu de la Hebrea alfabeto, kaj al la ordo de la literoj en la modernaj alfabetoj nun uzataj en Eŭropo. Por skribi Ugarite oni uzis kojnoformajn literojn (vidu la bildon ĉisuban), kiuj unuavide trompe similas al la alfabeto de Mezopotamio, tamen estas malsimilaj laŭ formo kaj sonvaloro.



La Ugarita alfabeto sur argila tabuleto trovita ĉe Ras-es-Ŝamra

La alfabeto konsistas el 30 literoj, el kiuj 27 estas konsonantoj. La tri vokaloj a, i, kaj u estis skribataj nur kiam ili komencas silabon. Pro tio ni ne konas la vokalojn de la plej multaj vortoj. Tio kaŭzas la strangan aspekton de transskribitaj nomoj en niaj tekstoj, ekz. Aqht, kiu vere devus esti skribita Aq-h-t- por indiki ke vokaloj mankas en la skriba Ugarita formo. Kelkaj propraj nomoj estis uzataj ne nur en la Ugarita sed ankaŭ en aliaj lingvoj kies skribon ni konas, tiel ke ni kelkfoje povas reenmeti la mankantajn vokalojn. Ekzemple, la patro de Aqht estis D-n-il- laŭ la Ugarita skribo, verŝajne la plena formo de la nomo estis *Danilu.

Alia problemo estas multe pli grava: la stato de la argilaj tabuletoj mem. Kvankam bakitaj, do efektive ceramikaĵoj, la argilaj tabuletoj multe suferis dum jarmiloj da kuŝado en la tero. La plej multaj tabuletoj rompiĝis, kaj ofte la engravuritaj literoj tiom frotiĝis ke ili ne plu estas legeblaj. (Vidu foton sur paĝo 42.) Kvankam origine la tabuletoj portis sur la randoj mencion pri la enhavo kaj la ĝusta ordo de la tabuletoj, preskaŭ ĉiam tiuj indikoj nun ne plu estas legeblaj. Tial ofte ekzistas dubo pri la ordo de la tabuletoj kiuj surhavas partojn de longa rakonto. Pli malfaciligante la situacion, la teksto tre ofte enhavas vortojn kiujn

lingvistoj ankoraŭ ne komprenas. Estas kvazaŭ oni strebus legi anglalingvajn tekstojn konante nur la Germanan, Svedan, Francan, kaj Grekan lingvojn. Post multa strebado oni ja sukcesis kompreni grandan parton de la legeblaj tekstoj, sed multaj frazoj kaj eĉ tutaj alineoj restas tute ne kompreneblaj.

Pro ĉi tiuj problemoj, tradukoj multe varias rilate al la detaloj de la rakontoj. Farante la tradukojn prezentatajn ĉi tie, mi strebis laŭeble indiki al la leganto, kiam temas pri konjektoj kaj ne tute certa kompreno de la Ugarita teksto. Mi utiligis la sekvantajn rimedojn por tion indiki:

• Kiam teksto estas preskaŭ plene nekomprenebla, aŭ nelegebla, ĉu pro la fizika stato de la tabuletoj, ĉu pro necerteco pri la signifo de la vortoj, mi ellasas la tekston kaj indikas la ellason per serio da punktoj (…).

• Kiam teksto estas pro ia kaŭzo ne certe komprenebla, aŭ legebla, sed sufiĉo estas legebla kaj komprenebla por fari ian tradukon verŝajna, mi donas tiun tradukon per kursivaj literoj. Kiam mi resumas plurajn liniojn da ne tute legebla teksto, mi uzas neordinare larĝajn marĝenojn, tiel ke la leganta okulo facile distingas mian resumadon. Kiam mi reestablas mankantajn vortojn en specifa linio, mi metas ilin en la normalajn poziciojn kiujn ili havus en bone legebla teksto, sed mi konservas kursivojn kaj ankaŭ enmetas parentezojn. Ekzemple:

Ŝi (*preĝis*) al Kompata Dio, la Virbovo,
ŝi petadis la Kreinton.

ĉar la vorto "preĝis" nun ne estas legebla en la Ugarita teksto pro la malbona stato de la tabuleto, sed plejverŝajne tiu estis la intencita vorto.

Kiel bazon por la tradukoj mi utiligis la eldonon de C.H. Gordon en Ugaritic Textbook (Romo: Pontificium Institutum Biblicum, 1965). Ties gramatikaj komentoj kaj leksikono ankaŭ servis kiel la ĉefa fundamento de la tradukoj. Mi komparis la tradukojn kun aliaj aŭtoritataj nacilingvaj tradukoj, kaj utiligis kelkajn trovojn kiuj aperis post 1965. Kelkfoje mi mem povis aldoni kelkajn trovaĵojn. Mi strebis plejeble konservative traduki, t.e. eviti konjektojn kaj nepruvitajn tradukojn, ĉar la graveco de ĉi tiuj tekstoj por la historio de religioj kaj de mitologio estas tre granda, tial oni bezonas scii precize kion oni povas fidi en la tradukaĵoj.

La teksto de la traduko de Baal kaj Anat unue aperis en la unua serio de Biblia Revuo, eldonita en limigita eldono de nur 50 ekzempleroj. Ĉar tiu privata eldono estis jam delonge elĉerpita, mi republikigis ĝin, kun traduko de du aliaj Ugaritaj eposoj, en Biblia Revuo 1971/4, ankaŭ nun

delonge elĉerpita. Por la nuna eldono la teksto estas korektita, kaj mi enmetis aron da piednotoj.

La legado de ĉi tiuj eposoj estas unue iom stranga por modernuloj, ĉar ilia poezia formo estas tre malfamiliara. La bazo de la poezia formo estas relative rigida skemo de ripetado, kiun tamen la recitanto povis variigi: post ĉiu frazo sekvas paralela(j) frazo(j) kiu(j) spegulas la unuan, ekzemple:

> Mi fluigos sangon sur liaj grizaj haroj,
> mi kovros lian grizan barbon per sango.

Tre ofte la dua frazo ripetas la samajn vortojn preskaŭ precize:

> La Sinjoro resanigu la flugilojn de la agloj,
> la Sinjoro resanigu iliajn flugilojn!

La tekstoj de la Ugaritaj poemoj estis diktitaj de profesiaj recitistoj al skribistoj de la biblioteko de la palaco de la reĝo de Ugarito, kaj ties nomoj estas kelkfoje ankoraŭ legeblaj ĉe la finoj de la tabuletoj. Kiam oni zorge ekzamenas la tabuletojn, estas evidente ke kelkaj tekstoj kiuj apartenas al unusama poemo tamen estis diktitaj de diversaj recitistoj; kelkfoje kelkaj ekzempleroj de unusama teksto troveblas, kvankam ne ĉiam kun precize identa enhavo. Tio kredigas ke kvankam la tekstoj estis fiksitaj per la tradicioj, la preciza enhavo povis iom varii laŭ la recitisto. Tre klare estas ke la poezia formo de la tekstoj ne estis rigide fiksita.

Pro alilingvaj aludoj al la poemoj en literaturoj de najbaraj socioj, antaŭ 1500 a.K., ni scias ke la poemoj ne estis origine verkitaj por ĉi tiuj tabuletoj en la palaca biblioteko de Ugarito, sed ekzistis jam plurajn jarcentojn pli frue.

La rolantoj en la poemoj

Kelkaj rolantoj en la eposaj poemoj estas jam familiaraj pro sia apero en aliaj literaturoj, kaj aliaj estas tute novaj por ni. Ĉefaj estas:

Dio (Ugarite, *il* = **ilu*). Ĉi tiu vorto estas la normala simpla substantivo signifanta “dio”, kaj ankaŭ propra nomo transskribenda per majusklo: *Dio*. Ĝi estas lingvistike kognato de la Hebrea vorto *El* kaj de la Araba vorto *Allah*. En la Ugaritaj poemoj *Dio* estas ofte kromnomata “Afabla”, “Kompata”, “la Patro”, “la Virbovo”, “la Kreinto”.

La Sinjoro (Ugarite, *bʿl* = **baʿalu*). Ĉi tiu vorto estas kognato de la Hebrea vorto *Baʿal*. Kiel ordinara substantivo la vorto signifas "mastro", "sinjoro", kaj en la Hebrea ankaŭ "edzo". En la Ugarita lingvo ĉi tiu vorto estis ne nur ordinara substantivo sed ankaŭ propra nomo, tradukata en ĉi tiuj poemoj kiel "La Sinjoro". En la Hebrea lingvo la sinonima vorto "adon(aj)" estis pli ofte uzata por la religia senco "la Sinjoro".



Baal, kun fulmo en la mano

Anat (Ugarite: *ant* = **Anatu*). La fratino kaj edzino de Baal, populara tra la tuta antikva Palestino. Inter ŝiaj epitetoj estis "Patrino de Nacioj", kaj "Juna Anat".

Aŝtaratu/Aŝera (Ugarite: *aŝtrt* = **Aŝtaratu*, *aŝrt* = ?**Aŝratu*). En aliaj literaturoj oni tradicie transliterumis: Aŝtarte, Astarte. Aŝtoret, Iŝtar. En la Ugaritaj tekstoj kelkfoje eble estas distingitaj la nomoj Aŝtaratu kaj Aŝera, sed tio ne estas certa pro la malbona stato de la tabuletoj. La origina signifo de la vorto eble estis *Utero* = *Patrino*. En la eposaj poemoj

ŝi estas la edzino de Dio, la "Kreintino", kaj ŝi estas la patrino de aŝtr = Venuso. Notu ke en la Londona Biblio, la Hebrea nomo de la diino estis mistransskribita Aŝtar en Esperanto, farante el ŝi virdion. Ŝia rita simbolo estis stango vertikale starigita en la tero.

Venuso (Ugarite: *aŝtr* = **Aŝtaru*). En la eposoj ĉi tiu rolas nur tre malofte.

Suno (Ugarite: *ŝpŝ* = **ŝapaŝu*). Ŝi, kompreneble, loĝas en la ĉielo kaj vidas ĉion.

Muziko-kaj-Memoro (Ugarite: *kŝr-ŭ-ĥss*). Ĉi tiu traduko de la nomo estas necerta. Ĝi aludas al la tradiciigo de religiaj rakontoj per kantado. Li estas la ĉarpentisto, kiu faras ĉion bezonatan en la ĉielo. Ankaŭ li estas ofte nomata *Hjn* (signifo nekonata). Povas esti ke *Ilŝu* estas alia titolo lia.

Vito kaj *Ugar* (Ugarite: *gpn* kaj *ugr* = **Ugaru*). Ili estas mesaĝistoj, en la poemoj. *Ugar* estis la patrono de la urbo Ugarito, kaj laŭtradicie la urbo ricevis sian nomon pro li.

Greno (Ugarite: *dgn* = **daganu*). Menciita nur trifoje, kaj sen propra rolo en niaj tekstoj. Baal estas epitetata "*Filo de Greno*", kaj la Grekigita mito pri Adonis supozigas ke Adonis estis la spirito de greno.

Maro (Ugarite: *jm* = **jamu*). Ankaŭ nomata *ltn* = **Lotanu*, vorto kognata kun la Hebrea vorto *Levjatan*. Epitetoj liaj estas "la malbona Serpento", "la mastro", kaj li estas tre ofte nomata *Juĝisto Rivero* (Ugarite: *nhr* = **Naharu*).

Morto (Ugarite: *mt* = **motu*), kognata kun la Hebrea vorto *maŭet*. Ĉi tiun ni jam tre bone konas en nia propra epoko.

Pluraj aliaj rolantoj estas menciitaj en la teksto sen detaloj, inkl. *P-r-d-m-n-* (signifo nekonata), kaj *Sankteco-kaj-Beno* (traduko necerta) la servisto de *Aŝera*.

Atentu ke plej verŝajne pluraj el ĉi tiuj rolantoj estis nur poezie nomigitaj, kaj ne nepre estis "dioj" en la teologio mem de Ugarito.

Baal kaj Anat

La ordo de la tabuletoj en la skribita formo de ĉi tiu eposo ne estas ĉiam klara. Kompletaj tabuletoj kutime surhavas indikon pri sia ordo, sed la nelegebla aŭ rompita karaktero de la supro, malsupro, kaj flankoj de la plej multaj tabuletoj ofte perdigis por ni tiun indikon. Oni povas facile dividi la tabuletojn en kvar grupojn:

La batalo kontraŭ la Maro
La batalado de Anat
La konstruado de Domo
La morto kaj reviviĝo de Baal

La ordo de la tabuletoj kaj kolumnoj en ĉiu grupo estas certa, sed la ordo de la grupoj mem ne estas certa. Kelkaj komentintoj opinias ke ne temas pri unusola eposo sed pri kolekto de apartaj kaj inter si sendependaj rakontoj pri Baal kaj Anat, sed mi kredas ke tiu vidpunkto estas erara.—DB

La batalo kontraŭ la Maro[2]

(Gordon, *U.T.*, tekstoj 137, 68 = III AB, B, III AB, A.)

En la komenco de la tabuleto, ni trovas ke disputo okazas inter Maro kaj la Sinjoro, kaj Maro minacas la Sinjoron. Maro alvokas mesaĝistojn, kaj donas al ili komunikon:

"Iru, knaboj, sen hezito,
iru al la Asembleo,
al Dio sur la Nokta Monto.
Ne klinu vin antaŭ la Asembleo—
Diru vian komunikon,
informu Dion, la Patron, la Virbovon,
sciigu al la Asembleo:
'Jen vorto de via mastro, Maro,
de via sinjoro, Juĝisto Rivero[3]:
Transdonu la dion kiun vi protektas,
kiun protektas la popolo!
Transdonu la Sinjoron, por ke mi rigardu lin,
la filon de Greno, por ke mi rabu lin!'"

---

[2] Ĉi tiu kaj ĉiuj aliaj titoloj de partoj de la poemo estis enmetitaj de la tradukinto.
[3] En la Palestina socio, "Juĝisto" estis loka/regiona reganto, kies ĉefa tasko estis juĝi en regiona tribunalo.

La servistoj iris, sen hezito,
iris al la Nokta Monto,
Al la Asembleo
kie sidis la dioj...
La sanktuloj pretis manĝi,
la Sinjoro servis Dion.
Tuj kiam la dioj vidis ilin,
vidis la mesaĝistojn de Maro,
la senditojn de juĝisto Rivero,
La dioj klinis siajn kapojn al la genuoj,
sur siaj reĝaj seĝoj.
La Sinjoro riproĉis ilin:
"Dioj, kial vi klinis viajn kapojn al la genuoj,
sur viaj reĝaj seĝoj?
Dioj, vi devos respondi la tabuletojn de la mesaĝistoj de Maro,
de la senditoj de Juĝisto Rivero.
Dioj, levu viajn kapojn de sur la genuoj,
de viaj reĝaj seĝoj.
Mi mem respondos al la mesaĝistoj de Maro, al la senditoj de Juĝisto Maro."
La dioj levis siajn kapojn de sur la genuoj,
de siaj reĝaj seĝoj.
Kiam venis la mesaĝistoj de Maro,
la senditoj de Juĝisto Rivero antaŭ Dion,
Ili ne klinis sin antaŭ la Asembleo.—
Ili diris sian komunikon.
(sekvas nekomprenebla linio)
Ili diris al Dio, la Patro, la Virbovo:
"Jen vorto de via mastro, Maro,
de via sinjoro, Juĝisto Rivero:
'Transdonu la dion kiun protektas la popolo,
transdonu la Sinjoron, por ke mi rigardu lin
la filon de Greno, por ke mi rabu lin!'"
Dio, la Patro, la Virbovo, respondis:
"La Sinjoro estas via sklavo, Maro,
la Sinjoro estas via sklavo,
la filo de Greno estas via kaptito.
Li donos al vi tributon, kiel la aliaj dioj:
li donos al vi tributon, kiel la aliaj sanktuloj."

La Sinjoro, la Princo, furiozis.
Li prenis batilon enmane,
    hakilon enmane,
    li batis la servistojn.
Anat (?) prenis lian dekstran brakon,
    Aŝtaratu (?) lian maldekstran brakon:
"Kiel vi povas bati la mesaĝistojn de Maro,
    la senditojn de Juĝisto Rivero?
Mesaĝiston *(sur la ŝultron)*,
    mesaĝiston sur la dorson?"
Ŝia mastro respondis—

> *ke li rifuzas agnoski la minacon de Maro, kaj ke li intencas batali kontraŭ li. Muziko-kaj-Memoro*[4] *promesas helpi, kaj transdonas al li du batilojn:*

Muziko-kaj-Memoro diris: Teksto 6:
"Mi diras al vi, Sinjoro Princo,
    mi diras al vi, Nub-Rajdanto:
Nun, Sinjoro, viajn malamikojn,
    nun vi batos viajn malamikojn,
    nun vi detruos viajn kontraŭantojn.
Vi transprenos vian eternan regnon,
    vian senfinan regadon."
Muziko alportis du batilojn,
    li donis al ili nomojn:
"Via nomo estas Elĉasu:
    elpelu Maron!
Elpelu Maron de lia trono,
    Riveron de lia reĝa seĝo!
Suben iru, en la manoj de la Sinjoro,
    kiel aglo inter liaj fingroj.
Batu la dorson de Princo Maro,
    inter la ŝultroj de Juĝisto Rivero."
La batilo suben iris, en la manoj de la Sinjoro,
    kiel aglo inter liaj fingroj.
Ĝi batis la dorson de Princo Maro,
    inter la ŝultroj de Juĝisto Rivero.

[4] Verŝajne "Perkanta Memorado", la ĉefa metodo diskonigi la tradiciojn de la socio.

Sed Maro ne cedis,
lia dorso ne tremis,
lia korpo ne rompiĝis.
Muziko alportis du batilojn,
li donis al ili nomojn:
“Via nomo estas Elĉasu:
elĉasu, elĉasu Maron!
Elĉasu Maron de lia trono,
Riveron de lia reĝa seĝo!
Suben iru, en la manoj de la Sinjoro,
kiel aglo inter liaj fingroj.
Batu la kapon de Princo Maro,
inter la okuloj de Juĝisto Rivero.
Kolapsu Maro, li falu teren.”
La batilo suben iris, en la manoj de la Sinjoro,
kiel aglo inter liaj fingroj.
Ĝi batis la kapon de Princo Maro,
inter la okuloj de Juĝisto Rivero.
Kolapsis Maro,
li falis teren.
Lia dorso tremis,
lia korpo rompiĝis.
La Sinjoro trenis Maron,
volis detrui Juĝiston Riveron.
Aŝtaratu riproĉis lin, nomante lin:
“Hontu, Potenca Sinjoro!
Hontu, Nub-Rajdanto!
Princo Maro estas nia kaptito,
Juĝisto Rivero estas nia kaptito.”
Kiam *(ŝi diris tion)*,
hontis la Potenca Sinjoro.

Maro do ne mortis, sed li agnoskis ke de nun la Sinjoro estas la mastro kiun li servos.

La batalo de Anat

(Gordon, *U.T.*, teksto 'nt):

En la komenco de la tabuleto, la Sinjoro manĝas dum bankedo, dum Anat (kiel ni vidos) okupas sin aliloke.

P-r-d-m-n- servis al la Potenca Sinjoro, Kol. I:
helpis la Sinjoron, Princon de la Tero.
Li staris, preta servi lin,
li donis al li mampecon,
per akra tranĉilo tranĉis grasan pecon.
Li elverŝis por li drinkaĵon,
li metis en lian manon tason,
vinglason en liajn manojn.
La glaso estis eksterordinare eleganta:
Kian neniam vidis virino,
glaso, kian neniam vidis eĉ Aŝera.
Li prenis mil potojn da vino,
enmiksis nekalkuleblan nombron da ujoj.
Li staris, li kantis,
la cimbaloj sonoris en liaj lertaj manoj.
La knabo kun bela voĉo kantis
pri la Sinjoro sur la Altaĵo Capan[5].
La Sinjoro rigardis siajn filinojn,
rigardis Pidrion[6], filinon de Lumo,
kaj Roson, filinon de Pluvo.

Dum la Sinjoro bankedas, Anat okupas sin per milito. En la sekvanta teksto, la vortoj "fortege" kaj "la urbanoj" estus egale tradukeblaj "en la valo" kaj "inter la urboj"

Nun Anat batalis fortege, Kol. II:
ŝi militis kontraŭ la urbanoj.
Ŝi militis kontraŭ la okcidenta popolo,
ŝi detruis la orientan popolon.
Sub ŝi svarmis kapoj, kiel vulturoj,
super ŝi manoj, kiel lokustoj.
Anat sukcese buĉis multajn homojn.
Ŝi vadis ĝisgenue en la sango de soldatoj,
ĝiskole en la sango de batalistoj.
Per batilo ŝi elpelis (*ilin*),
elpelis ilin per la dorso de pafarko.

---

[5] Monto aludita kelkfoje en la Biblio laŭ la Hebrea literumo "Cafon", kiu eble en la Hebrea signifis "Norda", t.e. "La Norda Monto".
[6] *Pidrio* (Ugarite: *pdri*) estis preskaŭ certe ordinara vorto kun signifo ne konata de ni.

Post tio, Anat iris al sia domo,
la diino venis al sia palaco.
Ŝi ankoraŭ ne ĝissate batalis fortege,
militis kontraŭ la urbanoj.
Ŝi ĵetis seĝojn kontraŭ la soldatojn,
ŝi ĵetis tablojn kontraŭ la batalantojn,
piedapogilojn kontraŭ la militistojn.
Ŝi batalis senpaŭze, poste rigardis:
Anat militis, poste vidis.
Ŝi ridis aplombe,
ĝojo plenigis ŝian koron,
ĉar en la manoj de Anat estis venko.
Ŝi vadis ĝisgenue en la sango de soldatoj,
ĝiskole en la sango de batalistoj.
Ŝi batalis, ĝis ŝi estis sata,
en la domo, ŝi batalis inter la tabloj.
Ŝi elverŝis sangon de soldatoj,
elverŝis pacoleon en ujon.
Juna[7] Anat lavis siajn manojn,
la Patrino de Nacioj lavis siajn fingrojn,
Ŝi lavis siajn manojn per la sango de soldatoj,
siajn fingrojn per la sango de batalistoj.
Anat nun reordigis sian domon.
Ŝi elverŝis akvon, por lavi sin,
roson de la ĉielo,
Oleon de la tero,
pluvon de la Nub-Rajdanto.
Roso fluis de la ĉielo,
pluvo fluis de la steloj.

La Sinjoro sciiĝis pri la agado de Anat, kaj li tre koleris pro la afero. Sed kiel ĉesigi la militon? Li faris planon: li alvokis mesaĝistojn, kaj donis al ili specialan komunikon por Anat. Li diris al ili:

"Klinu vin antaŭ la piedoj de Anat, Kol.III:
surteren falu,
honoru ŝin.

[7] La epiteto "Juna" en la tre ofta Ugarita esprimo "Juna Anat" estis ofte tradukata "Virgulino" en pli fruaj tradukoj de la Ugaritaj poemoj. Sed la koncerna Ugarita vorto neniam signifis nek uziĝis por ĉi tiu signifo.

Diru al juna Anat,
diru al la patrino de Nacioj,
Jen komuniko de la Potenca Sinjoro,
vorto de la Potenca Hakilo:
Vi, amanta militadon,
verŝu amikecon sur la grundon.
Verŝu pacon sur la Teron,
pacon sur la kamparon.
Viaj *(sanktaj insignoj)* estas kun mi,
Kurigu viajn piedojn al mi,
rapidigu viajn krurojn,
Ĉar vorton mi deziras diri,
ion por vi mi komunikos.
Vorton de arbo,
flustron de ŝtono,
kiel parolas la ĉielo al la tero,
kaj Oceano kun la steloj.
Mi komprenas fulmon kian ne konas la ĉielo,
vortojn kiajn ne konas la homaro,
kiajn ne komprenas la terhomoj.
Venu, mi montros,
Sur mia dia Monto Capan,
sur mia sankta monto,
sur mia bela Monto Venko."
Anat vidis la diojn,
ŝiaj piedoj tremis sub ŝi.
Ŝia dorso agitiĝis,
ŝia vizaĝo ŝvitis.
Ŝiaj vertebroj skuiĝis,
(ŝia dorso malkvietiĝis.)
Ŝi elkriis:
"Kial venis Vito kaj Ugar?
Kiu malamiko levis sin kontraŭ la Sinjoro?
Kiu minacas la Nub-Rajdanton?
Ĉu mi ne detruis Maron, la Amaton de Dio,
Ĉu mi ne mortigis grandan, dian Riveron?
Ĉu mi ne buŝumis la Drakon,
buŝumis kaj detruis la tordiĝantan Serpenton?
La Princon kun sep kapoj?

Mi detruis la Amaton de Dio,
morta sur la tero estas la dia bovido -t-i
Mi detruis la dian hundon Fajro,
mi mortigis la filinon (?) de dia Muŝo.
Mi *(sukcesoplene)* batalis kontraŭ
tiu kiu pelis la Sinjoron de la Altaĵo Capan,
(Fortranĉis?) liajn orelojn, kiel de birdo,
pelis lin de lia reĝa seĝo, Kol. IV:
de lia posteno, de lia reĝa trono.
Kiu malamiko levis sin kontraŭ la Sinjoro?
Kiu minacas la Nub-Rajdanton?"
Respondis la servistoj:
"Neniu malamiko levis sin kontraŭ la Sinjoro.
Neniu minacas la Nub-Rajdanton.
Jen komuniko de la Potenca Sinjoro,
vorto de la Potenca Hakilo,
'Vi, amanta militadon,
verŝu amikecon sur la grundon.
Verŝu pacon sur la Teron,
pacon sur la kamparon.
Viaj (sanktaj insignoj) estas kun mi,
Kurigu viajn piedojn al mi,
rapidigu viajn krurojn,
Ĉar vorton mi deziras diri,
ion por vi mi komunikos.
Vorton de arbo,
flustron de ŝtono,
kiel parolas la ĉielo al la tero,
kaj Oceano kun la steloj.
Mi komprenas fulmon kian ne konas la ĉielo,
vortojn kiajn ne konas la homaro,
kiajn ne komprenas la terhomoj.
Venu, mi montros,
Sur mia dia Monto Capan,
sur mia sankta monto,
sur mia bela Monto Venko.'"
Juna Anat respondis,
diris la Patrino de Nacioj:

"Mi, amanta militadon,
    verŝos amikecon sur la grundon,
Mi verŝos pacon sur la Teron,
    pacon sur la kamparon.
Anat diris ke la Sinjoro pretiĝu.
Mi, amanta militadon,
    verŝos amikecon sur la grundon,
Mi verŝos pacon sur la Teron,
    pacon sur la kamparon.
Ion pli mi diras al vi:
Iru, iru, dioj;
    vi malrapidas, mi rapidas.
U-'-r- ne estas malproksime de la dioj,
    I-n-b-b- ne estas malproksime de la dioj."
    La distanco ne estas tre granda.
Ŝi ekiris, celante la Sinjoron sur la Altaĵo Capan.
Mil kampojn ŝi transiris,
    milojn da spacoj.
La Sinjoro vidis ke venas lia fratino,
    ke proksimiĝas lia kunnaskitino.
Li forsendis siajn edzinojn de ŝi.
Li metis bovon antaŭ ŝin,
    grasan beston antaŭ ŝin.
Ŝi elverŝis akvon por lavi sin,
    roson de la ĉielo,
    oleon de la tero.
Roso fluis de la ĉielo,
    pluvo fluis de la steloj.
        Anat kaj la Sinjoro manĝis, kaj dume la Sinjoro sciigis al ŝi la gravan komunikaĵon, nome ke:
"La Sinjoro ne havas domon kiel la dioj, Kol. V:
    ne havas palacon kiel la filoj de Aŝera,
Kiel la domon de Dio,
    la domon de lia filo,
La domon de Sinjorino Aŝera de la Maro,
    la domon de Pidrio, filino de Lumo,
La domon de Roso, filino de Pluvo,
    la domon de Tero, filino de J-'-b-d-r-,
La domon de la famaj edzinoj."

Juna Anat respondis:
“Mia Patro, Dio, la Virbovo, diros al mi
permeson ke oni konstruu palacon por la Sinjoro. Se Dio rifuzos tiun permeson,
Mi tretos sur li kiel sur ŝafido sur la tero.
Mi fluigos sangon sur liaj grizaj haroj,
mi kovros lian grizan barbon per sango,
Se li ne donos al la Sinjoro domon kiel de la dioj,
domon kiel de la filoj de Aŝera.”
Ŝi ekiris, rapidis trans la teron,
ekiris celante Dion,
Ĉe la fontoj de la riveroj,
inter la kurentoj de Oceano.
Ŝi iris al la loĝejo de Dio,
iris al la Tre Aĝa Patro.
Anat parolis kun Dio, la Patro, la Virbovo, kaj al li ŝi ripetis sian minacon:
“Mi fluigos sangon sur viaj grizaj haroj,
mi kovros vian grizan barbon per sango.”
Dio, en la Sep Ĉambroj, respondis:
Dio, en la Ok Loĝ-fakoj:
“Mi scias, mia filino, ke vi estas ekscitiĝema,
ke sinregon oni ne povas trovi en diino.
Kion vi volas Juna Anat?”
Juna Anat diris:
“Dio, saĝa estis via dekreto,
ĉar vi estas eterne saĝa.
Vi dekretis ke la Potenca Sinjoro nin regu,
li estu nia plejsupera reĝo.”
Anat plu parolas pri la alta valoro de la Sinjoro,
“Li apelas al sia Patro, Dio, la Virbovo,
al Dio, la Reĝo, kiu lin faris.
Li apelas al Aŝera kaj ŝiaj filoj,
al la Diino kaj ŝia familio.
La Sinjoro ne havas domon kiel la dioj,
ne havas palacon kiel la filoj de Aŝera,
Kiel la domon de Dio,
la domon de lia filo,

La domon de Sinjorino Aŝera de la Maro,
la domon de Pidrio, filino de Lumo,
La domon de Roso, filino de Pluvo,
la domon de Tero, filino de J-’-b-d-r-,
La domon de la famaj edzinoj.”

Dio decidas ke estas dezirinde konsulti Muzikon-kaj-Memoron, la konstruiston. Li alvokas mesaĝiston, ĉifoje la mesaĝiston de Sinjorino Aŝera de la Maro, ŝian “fiŝiston”:

“Iru, Fiŝisto de Aŝera, Kol. VI:
Marŝu, Sankteco-kaj-Beno.
Iru al dia Egiptio,—
al Kreto, kie li havas sian tronon,
al Egiptio, la lando kun li posedas;
Trans milojn da kampoj,
milojn da spacoj.
Klinu vin antaŭ Muziko, honoru lin.
Diru al Muziko-kaj-Memoro,
raportu al la metiisto H-j-n:
Jen komuniko de la Potenca Sinjoro,
vorto de la Potenca Hakilo:
Viaj *(sanktaj insignoj)* estas kun mi:
Kurigu viajn piedojn al mi,
rapidigu viajn krurojn…”

La sekvanta parto de la teksto ne estas sufiĉe legebla por prezento. Ŝajnas ke Anat mem ricevas taskon, fine, transkomuniki la mesaĝon al Muziko-kaj-Memoro, kaj la enhavo estas precize la vortoj kiujn ŝi ricevis antaŭe. Granda kvanto da teksto ne plu estas legebla.

La konstruado de Domo

Gordon, *U.T.*, teksto 51 = II AB.

“La Sinjoro ne havas domon kiel la dioj, Kol. I:
ne havas palacon kiel la filoj de Aŝera,
Kiel la domon de Dio,
la domon de lia filo,
La domon de Sinjorino Aŝera de la Maro,
la domon de la famaj edzinoj,
La domon de Pidrio, filino de Lumo,
la domon de Roso, filino de Pluvo,

La domon de Tero, filino de J-‘-b-d-r-,
Ion pli mi diras al vi:
Iru, petu Sinjorinon Aŝera de la Maro,
apelu al la Kreintino de la dioj:
Supreniru H-j-n al la bloviloj,
Memoro tenu la prenilojn per siaj manoj,
Li muldu arĝenton,
formigu oron,
Li muldu milojn da sikloj da arĝento,
formigu kvantegojn da sikloj da oro,
muldu arĝenton kaj oron,
Por fari *belaĵon* kun valoro de 20 000 sikloj,
belaĵon kovritan per arĝento,
kovritan per oro;
Kaj belan tronon,
sidejon supre,
belan piedapogilon malsupre,
Kaj belajn sandalojn,
kun rimenoj.
Li alportu por ili oron de bela tablo”,
ĝenerale, li faru multvalorajn aĵojn.
La Sinjoro kaj Anat do iris al Sinjorino Aŝera de la Maro. Ŝi honoradis Dion:
Ŝi (*preĝis*) al Kompata Dio, la Virbovo, Kol. II:
ŝi petadis la Kreinton.
Kiam ŝi levis la okulojn, ŝi vidis ke venas la Sinjoro,
kiam rigardis Aŝera, venas Juna Anat,
proksimiĝas la Patrino de Nacioj.
Ŝiaj piedoj tremis sub ŝi.
ŝia dorso agitiĝis,
Ŝia vizaĝo ŝvitis,
ŝiaj vertebroj skuiĝis,
(ŝia dorso malkvietiĝis).
Ŝi elkriis:
“Kial venas la Potenca Sinjoro?
Kial venas Juna Anat?”
Sinjorino Aŝera de la Maro estas tre maltrankvila unue. Sed ŝi vidas la multevalorajn donacojn kiujn alportas por ŝi la Sinjoro

kaj Anat, kaj tio helpas ŝin amikiĝi. Ni informiĝas ke la Sinjoro jam kolere konigis sian malplezuron en la Asembleo de la Dioj:

Li levis sin, Kol. III:
li kraĉis en la Dia Asembleo:
"Mi trinkis ĉagrenon ĉe mia tablo,
mi trinkis honton el taso!
La Sinjoro abomenas du specojn de bankedoj,
La Nub-Rajdanto malamas tri specojn de bankedoj,
Hontindajn bankedojn,
avarajn bankedojn,
bankedojn kun misuzo de sklavinoj.
Nun videblas hontindeco.
Nun estas misuzo de sklavinoj."
Post la alveno de la Potenca Sinjoro,
post la alveno de Juna Anat,
Ili petis Sinjorinon Aŝera de la Maro,
ili pledis kun la Kreintino de la dioj.
Sinjorino Aŝera de la Maro respondis:
"Kial vi pledas kun Sinjorino Aŝera de la Maro?
Kial vi petas la Kreintinon de la dioj?
Ĉu vi jam pledis kun Kompata Dio, la Virbovo?
Ĉu vi jam petis la Kreinton?"
Juna Anat respondis:
"Ni jam pledis, Sinjorino Aŝera de la Maro,
ni petis, Kreintino de la dioj."

Ŝi diras ke ŝi parolis sensukcese kun Dio, la Patro, la Virbovo, dum bankedo de la dioj. Sinjorino Aŝera de la Maro akceptas mem pledi por ili:

"Selu azenon, Kol. IV:
pretigu rajdbeston.
Surmetu arĝentan selon,
surmetu oran rajdilon.
Preparu la selon de mia azeno."
Sankteco-kaj-Beno obeis.
Li selis azenon,
pretigis rajdbeston.
Li surmetis arĝentan selon,
li surmetis oran rajdilon.
li preparis la selon de ŝia azeno.

Sankteco-kaj-Beno helpis ŝin.
Li metis Aŝeran sur la dorson de la azeno,
 sur la dorson de la azeno.
Sankteco komencis konduki,
 brilante kiel stelo antaŭ ili.
Juna Anat marŝis,
 kaj la Sinjoro reiris al la Altaĵo Capan.
Ŝi ekiris celante Dion,
Ĉe la fontoj de la riveroj,
 inter la kurentoj de Oceano.
Ŝi iris al la loĝejo de Dio,
 iris al la Tre Aĝa Patro[8].
Ŝi klinis sin antaŭ Dio,
 ŝi surteren falis kaj honoris lin.
Kiam Dio vidis ŝin,
 li malfermis siajn makzelojn kaj ridis.
Li metis siajn piedojn sur la apogilon,
 kaj kunplektis siajn manojn.
Dio elkriis:
"Kial venis Sinjorino Aŝera de la Maro?
 Kial alvenis la Kreintino de la dioj?
Certe ĉar vi malsatas:
 certe ĉar vi soifas…
Manĝu kaj trinku.
 Manĝu de la tablo.
Trinku vinon el la glasoj,
 vitbersukon el la oraj tasoj.
Aŭ ĉu eble la amado de la Reĝo, la amado de Dio, vekis vin?
 Ĉu la amado de la Virbovo vigligis vin?"
Sinjorino Aŝera de la Maro respondis:
"Dio, saĝa estis via dekreto,
 ĉar vi estas eterne saĝa.
Vi dekretis ke la Potenca Sinjoro nin regu, Kol. V:
 li estu nia plejsupera reĝo."
 Aŝera plu parolas pri la alta valoro de la Sinjoro.
"Li apelas al sia Patro, Dio, la Virbovo,
 al Dio, la Reĝo, kiu lin faris.

[8] Laŭvorte "Patro de Jaroj", idiotisma esprimo kies signifo verŝajne estis "Tre Aĝa Patro" kaj ne "Patro [t.e. Origino] de la Tempo".

Li apelas al Aŝera kaj ŝiaj filoj,
al la Diino kaj ŝia familio.
La Sinjoro ne havas domon kiel la dioj,
ne havas palacon kiel la filoj de Aŝera,
Kiel la domon de Dio,
la domon de lia filo,
La domon de Sinjorino Aŝera de la Maro,
la domon de la famaj edzinoj,
La domon de Pidrio, filino de Lumo,
la domon de Roso, filino de Pluvo,
la domon de Tero, filino de J-‘-b-d-r-.”
Afabla, Kompata Dio respondis:
“Mi aranĝos, diino Aŝera,
mi aranĝos.
Prenu fosileton,
sklavino pretigu brikojn.
Konstruiĝu domo por la Sinjoro,
kiel de la dioj,
kiel de la filoj de Aŝera.”
Sinjorino Aŝera de la Maro respondis:
“Dio, vi estas tre saĝa,
via maljuneco ja instruis al vi;
nun la Sinjoro povos prizorgi la veteron laŭ sia speciala tasko.
Li muĝu[9] de la nuboj,
li fulmu al la tero.
Li faru domon el cedra ligno,
domon el brikoj.
Oni diru al la Potenca Sinjoro:
Elkriu la planojn por via domo,
preparojn por via palaco.
La montoj donos al vi abundan arĝenton,
la montetoj puran oron.
La mino donos al vi ŝtonon,
por konstrui arĝentan kaj oran domon,
domon de lazurŝtonoj.”
Juna Anat ĝoje ekiris,
ŝi rapidis trans la teron,
al la Sinjoro sur la Altaĵo Capan,

[9] Poezia esprimo por “tondru”.

trans mil kampojn,
    milojn da spacoj.
Juna Anat ĝoje elkriis,
    ŝi kriis sian komunikon al la Sinjoro:
“Informiĝu, Sinjoro,
    mi havas por vi informon.
Konstruu por vi domon kiel de viaj fratoj,
    domon kiel de via familio.
Elkriu la planojn por via domo,
    preparojn por via palaco.
La montoj donos al vi abundan arĝenton,
    la montetoj puran oron.
Por konstrui arĝentan kaj oran domon,
    domon de lazurŝtonoj.”
La Potenca Sinjoro ĝojis.
Li elkriis la planojn por sia domo,
    preparojn por sia palaco.
La montoj donis al li abundan arĝenton,
    la montetoj puran oron.
La mino donis al li ŝtonon.
Li venigis Muzikon-kaj-Memoron,
    mesaĝistoj sendiĝis por informi lin.
Kiam Muziko-kaj-Memoro alvenis,
    li metis bovon antaŭ lin,
    grasan beston antaŭ lin.
Oni alportis seĝon,
    li sidis dekstre de la Potenca Sinjoro.
Ili manĝis kaj trinkis.
        La Potenca Sinjoro komunikis sian planon:
“Rapide konstruu domon,
    rapide pretigu palacon!
Rapide vi konstruu domon,
    rapide vi pretigu domon,
Rapide vi pretigu palacon
    sur la Altaĵo Capan.
Domon larĝan mil kampojn,
    palacon ampleksan milojn da spacoj.”
Muziko-kaj-Memoro diris:

“Aŭskultu, Potenca Sinjoro,
    pripensu, Nub-Rajdanto:
Mi metu fenestron en la domon,
    aperturon en la palacon.”
La Potenca Sinjoro respondis:
“Ne metu fenestron en la domon,
    neniun aperturon en la palacon.”
        La diskuto daŭris.
Muziko-kaj-Memoro diris: Kol. VI:
“Vi iam akceptos mian vidpunkton.”
Muziko-kaj-Memoro diris:
“Aŭskultu, Potenca Sinjoro:
Mi metu fenestron en la domon,
    aperturon en la palacon.”
La Potenca Sinjoro respondis:
“Ne metu fenestron en la domon,
    neniun aperturon en la palacon.
Por ke Pidrio, filino de Lumo, ne (forkuru),
    por ke Roso, filino de Pluvo, ne eskapu).
        Li imagas plurajn nedezirindajn situaciojn.
Muziko-kaj-Memoro diris:
“Sinjoro, vi iam akceptos mian vidpunkton.”
Oni konstruis lian domon…,
    oni pretigis lian palacon.
Oni mendis de Libano, kun ties cedroj,…
    de Sirio, kun ties valoraj cedroj,…
De Libano, kun ties arboj,
    de Sirio, kun ties valoraj cedroj.
Fajro metiĝis sur la domon,
    flamoj sur la palacon.
1 tagon, 2 tagojn, fajro manĝis la domon,
    flamoj kovris la palacon.
3 tagojn, 4 tagojn, fajro manĝis la domon,
    flamoj kovris la palacon.
5 tagojn, 6 tagojn, fajro manĝis la domon,
    flamoj kovris la palacon.
En la sepa tago la fajro forlasis la domon,
    la flamoj la palacon.

La arĝento fandita iĝis kuboj,
    la oro fandita iĝis brikoj.
La Potenca Sinjoro ĝojis:
"Mi konstruis mian domon per arĝento,
    mian palacon per oro."
La domo de la Sionjoro estis preta,
    Hadad[10] estis preta.
Li oferis bovojn kaj kaprojn,
    buĉis virbovojn kaj grasbestojn,
Ŝafojn kaj junajn bovidojn,
    ŝafidojn kaj kapridojn…
Li invitis siajn fratojn al la domo,
    sian familion al la palaco.
Li invitis la 70 filojn de Aŝera.
Li donis al la ŝaf-dioj vinon, ke ili trinku;
    li donis al la safin-diinoj vinon, ke ili trinku.
Li donis al la virbov-dioj vinon, ke ili trinku;
    li donis al la bovin-diinoj vinon, ke ili trinku.
Li donis al la tron-dioj vinon, ke ili trinku;
    li donis al la seĝ-diinoj vinon, ke ili trinku.
Li donis al la vaz-dioj vinon, ke ili trinku;
    li donis al la pot-diinoj vinon, ke ili trinku.
La dioj manĝis kaj trinkis,
    la mamsuĉantoj trinkis.
Per akra tranĉilo ili tranĉis grasan pecon,
    ili trinkis vinon el la glasoj,
    vitbersukon el la oraj tasoj.
        Post la bankedo la Sinjoro, nun vere Reĝo de la dioj, iras al la tero kaj konkeras por si urbojn, por havi regatojn:
Li reiris al la urboj. Kol. VII:
La Sinjoro kaptis 66 vilaĝojn,
    77 urbojn,
80 vilaĝojn,
    90 urbojn.
La Sinjoro reiris al la domo.
    La Potenca Sinjoro diris:
"Mi ja faros, Muziko, filo de Maro,
    Memoro, filo de '-d-t-.

[10] Oni proponis ke la vorto *Hadad* eble signifis *Tondranto*.

Estu fenestro en la domo,
    aperturo en la palaco.”
        Tra tio li povos muĝi de la nuboj.
Muziko-kaj-Memoro ridis,
    Muziko-kaj-Memoro elkriis:
“Mi ja diris, Potenca Sinjoro,
    ke vi iam akceptos mian vidpunkton.”
Li faris fenestron en la domo,
    aperturon en la palaco.
        La Sinjoro malfermis la fenestron, de la nuboj li muĝis per sia sankta voĉo, lia voĉo skuis la teron. Unue, la malamikoj de la Sinjoro terurite kuris al la arbaroj.
Tiam diris la Potenca Sinjoro:
“Kial vi *(kuras al la arbaroj)*, malamikoj de Hadad?
    Kial vi *(rapidas al la flanko de la monto)*?
        Li rigardis la teron, sed li vidis ion vere timigan pri kio li antaŭe ne sciis:
La Sinjoro reiris plorante al sia domo.
“Aŭ reĝo, aŭ ordinarulo,
    arogis al si regadon de la tero.
Mi sendu Dalilon al Dia Morto,
    ‘-d-d-on al la Amata Heroo de Dio.”
Morto pripensadis,
    la Amato meditadis:
“Nur mi devas regi la diojn,
    ordoni kaj diojn kaj homojn,
    komandi la homaron de la tero.”
La Sinjoro kriis al siaj servantoj,
    li rigardis al Vino kaj Ugar, filoj de Knabino,
    al Akvoj, filoj de T-l-m-t-.
        Al la mesaĝistoj la Sinjoro donis instrukciojn:
“Vi devas ekiri al Monto T-r-‘-z-z-, Kol. VIII:
    Al Monto Ŝ-r-m-g-,
    al la sulkoj de fekunda grundo.
Levu la monton per viaj manoj,
    la monteton per viaj manplatoj.
Suben iru en la subteron,
    kalkuliĝu kiel homoj enirantaj la teron.

Ekiru al lia urbo Pereo,
kie li sidas sur sia trono,
en sia regno.
Sed atentu, dioj…
ne proksimiĝu al Dia Morto,
Por ke li ne traktu vin kiel safviandon en sia buŝo,
por ke vi ne rompiĝu kiel ŝafo inter liaj makzeloj.
La Suno, la Dia Lumo, brilas,
sed la ĉielo haltas, pro la Die favorata Morto.
Transiru mil kampojn,
milojn da spacoj.
Klinu vin antaŭ la piedoj de Morto,
surteren falu,
honoru lin.
Diru al Dia Morto,
al la Amata Heroo de Dio:
'Jen komuniko de la Potenca Sinjoro,
vorto de la Potenca Hakilo:
Mi konstruis domon per arĝento,
palacon per oro…'"

La sekva parto de la komuniko estas perdita. Sed la sekvanta teksto montras ke la Sinjoro devas agnoski la pretendon de Morto. Morto donas defion, kiun la mesaĝistoj devos porti al la Sinjoro:

La morto kaj reviviĝo de Baal

Gordon, *U.T.*, tekstoj 67, 62, 49 = I * AB, I AB:

Teksto 67, Kol. I:

"Ĉar vi frapis Lotanon, la malbonan Serpenton,
ĉar vi detruis la tordiĝantan Serpenton,
La Princon kun sep kapoj,
vi devos esti punita.
Vi suben iros en la gorĝon de Dia Morto,
en la kolon de la Amata Heroo de Dio!"
La dioj foriris, kaj ne revenis,
ili ekiris celante la Sinjoron sur la Altaĵo Capan.
Vino kaj Ugar diris:
"Jen komuniko de Dia Morto,
vorto de la Amata Heroo de Dio:
Kiel leonino avidas manĝi ŝafon antaŭ si,

vi devos esti punita, devos eniri la gorĝon de Morto!" Kiam la Potenca Sinjoro aŭdis la defion,

La Potenca Sinjoro timis lin, Kol. II:
la Nub-Rajdanto teruriĝis pro li.
"Iru, diru al Dia Morto,
al la Amata Heroo de Dio:
Jen komuniko de la Potenca Sinjoro,
vorton de la Potenca Hakilo:
'Saluton al Dia Morto;
mi estas via eterna sklavo.'"
La dioj foriris, kaj ne revenis,
ili ekiris celante Dian Morton
En ties urbo Pereo,
kie li sidis sur sia trono,
en sia regno.
Ili elkriis:
"Jen komuniko de la Potenca Sinjoro,
vorto de la Potenca Hakilo:
'Saluton al Dia Morto;
mi estas via eterna sklavo.'"
Dia Morto ĝojis.

Kol. III kaj IV estas nelegeblaj. Evidentiĝas ke Morto sendis mesaĝistojn por venigi la Sinjoron. Denove la mesaĝistoj venis dum manĝadis la dioj. La Sinjoro ricevis instrukciojn:

"Nun, prenu viajn nubojn, Kol. V:
viajn ventojn, vian fulmon,
kaj viajn pluvojn kun vi.
Viajn sep servantojn,
viajn ok porkojn,
Pidrion, filinon de Lumo, kun vi,
Roson, filinon de Pluvo, kun vi.
Ekiru celante Monton K-n-k-n-j-.
Levu la monton per viaj manoj,
la monteton per viaj manplatoj.
Suben iru en la subteron,
kalkuliĝu kiel homoj enirantaj la teron.
Tiel, I-l-l- scios ke vi mortis."
La Potenca Sinjoro obeis,

Li amoris bovinon ĉe D-b-r-,
bovinon sur la kampoj de Ŝ-ĥ-l-m-m-t-.
Li koitis kun ŝi 77-foje,
seksumis kun ŝi 88-foje.
Ŝi gravediĝis kaj naskis filon.
La Sinjoro mortis en D-b-r-, kaj lian korpon trovis la mesaĝistoj.
Ili raportas al Dio, la Patro, la Virbovo:
"Ni venis al la bela lando D-b-r-, Kol. VI:
al la graciaj kampoj de Ŝ-ĥ-l-m-m-t-.
Ni trovis la Sinjoron, li kuŝas sur la tero;
la Potenca Sinjoro estas morta,
pereis la Sinjoro, Reganto de la Tero."
Afabla, Kompata Dio foriris de sia trono,
kaj sidis sur la piedapogilon.
Li foriris de sia piedapogilo,
kaj sidis sur la plankon.
Li ŝutis cindrojn sur sian kapon,
polvon sur sian kapon.
Li kovris sin per funebra mantelo.
Dio funebris lamente.
Li tranĉis siajn vangojn kaj mentonon,
li tranĉis sian brakon,
Traplugis sian bruston kvazaŭ ĝardenon,
trairis sian dorson kvazaŭ ebenaĵon.
Li elkriis:
"Mortis la Sinjoro!
Ve, popolo de la Filo de Greno!
Ve, popolo de Aŝr-Baal!
Mi suben iros al la tero."
Ankaŭ Anat transvagis ĉiun monton sur la tero,
ĉiun monteton sur la kamparo.
Ŝi venis al la bela lando D-b-r-,
al la graciaj kampoj de Ŝ-ĥ-l-m-m-t-.
Ŝi trovis la Sinjoron, li kuŝis sur la tero.
Ŝi kovris sin per funebra mantelo.
Ŝi funebris lamente.
Ŝi tranĉis siajn vangojn kaj mentonon,
ŝi tranĉis sian brakon,

Traplugis sian bruston kvazaŭ ĝardenon,
trairis sian dorson kvazaŭ ebenaĵon.
"Mortis la Sinjoro!
Ve, popolo de la Filo de Greno!
Ve, popolo de Aŝr-Baal!
Ni iru kun li en la teron."
La Suno, la Dia Lumo, suben iris,
ĝis ŝi satis per plorado,
trinkinte larmojn kvazaŭ vinon.
Ŝi kriis al la Suno, la Dia Lumo,
"Metu la Potencan Sinjoron sur min."
La Suno, la Dia Lumo, obeis.
Ŝi levis la Potencan Sinjoron,
ŝi metis lin sur la ŝultrojn de Anat.
Ŝi portis lin al la Altaĵo Capan,
ŝi funebris pri li.
Ŝi enterigis lin,
metis lin en tombon,
en la tombaron de la terdioj.
Ŝi oferis 70 bovojn,
oferon por la Potenca Sinjoro.
Ŝi oferis 70 virbovojn,
oferon por la Potenca Sinjoro.
Ŝi oferis 70 ŝafojn,
oferon por la Potenca Sinjoro.
Ŝi oferis 70 cervojn,
oferon por la Potenca Sinjoro.
Ŝi oferis 70 kaprojn,
oferon por la Potenca Sinjoro.
Ŝi oferis 70 azenojn,
oferon por la Potenca Sinjoro.
Kaj diversajn aliajn bestojn ŝi oferis. Sinjorino Aŝera de la Maro informiĝis pri la morto de la Sinjoro, kaj tute ne funebris:
Ŝi iris al Dio ĉe la fontoj de la riveroj, Teksto 49, Kol. I:
inter la kurentoj de Oceano.
Ŝi iris al la loĝejo de Dio,
iris al la Tre Aĝa Patro.
Ŝi klinis sin antaŭ la piedoj de Dio,
surteren falis kaj honoris lin.

Ŝi elkriis:
"Nun ĝoju Aŝera kun siaj filoj,
kun sia tuta familio!
Ĉar mortis la Potenca Sinjoro,
pereis la Sinjoro, Reganto de la Tero."
Dio kriis al Sinjorino Aŝera de la Maro:
"Aŭskultu, Sinorino Aŝera de la Maro:
Indiku unu el viaj filoj,
lin mi faros reĝo."
Sinorino Aŝera de la Maro respondis:
"Ni faru J-d-'-j-l-ĥ-n-on reĝo."
Afabla, Kompata Dio respondis:
"Li estas tro malgranda, ne povas kompariĝi kun la Sinjoro,
ne povas ĵeti lancon konkure kun la Filo de Greno."
Sinorino Aŝera de la Maro respondis:
"Do ni faru Timigan Venuson reĝo,
regu Timiga Venuso."
Tuj Timiga Venuso supreniris al la Altaĵo Capan,
kaj sidiĝis sur la tronon de la Potenca Sinjoro.
Sed liaj piedoj ne atingis la apogilon,
lia kapo ne atingis la supron.
Timiga Venuso suben iris,
li suben iris de la trono de la Potenca Sinjoro,
kaj ekregis la teron de Dio.
Do neniun reĝon nun havis la dioj. Eble Aŝera povis ĝoji pri la situacio, sed Anat ne. Ŝi decidis mem solvi la problemon:
Unu tago, du tagoj forpasis, Kol. II:
tagoj iĝis monatoj.
Juna Anat serĉis lin.
Kiel la koro de bovino al sia ido,
kiel la koro de ŝafo al sia ido,
tiel sopiris la koro de Anat al la Sinjoro.
Ŝi kaptis Morton per la rando de lia robo,
kaptis lin per la flanko de liaj vestoj.
Ŝi elkriis:
"Vi, Morto, donu al mi mian fraton!"
Dia Morto respondis:
"Nur petu, Juna Anat!

Mi transvagis ĉiun monton sur la tero,
    ĉiun monteton sur la kamparo.
Oni perdis sian libidon[11],
    oni sur la tero.
Mi venis al la bela lando D-b-r-,
    al la graciaj kampoj de Ŝ-ĥ-l-m-m-t-.
Mi renkontis la Potencan Sinjoron,
    mi traktis lin kiel ŝafviandon en mia buŝo,
    li rompiĝis kiel ŝafo inter miaj makzeloj."
La Suno, la Dia Lumo, brilis,
    sed la ĉielo haltis, pro Dia Morto.
Unu tago, du tagoj forpasis,
    tagoj iĝis monatoj.
Juna Anat serĉis lin.
Kiel la koro de bovino al sia ido,
    kiel la koro de ŝafo al sia ido,
    tiel sopiris la koro de Anat al la Sinjoro.
Ŝi kaptis dian Morton,
    ŝi distranĉis lin per glavo.
Ŝi draŝis lin per ilo,
    ŝi ardigis lin per fajro.
Ŝi muelis lin per muelŝtonoj,
    ŝi plantis lin en kampo,
Kie la birdoj manĝis la karnerojn,
    kie la birdoj detruis la karnon,
    ĝuis la karnon.
Pereis la Sinjoro, Reganto de la Tero! Kol. III:
Se nur vivus la Potenca Sinjoro,
    se nur pluvivus la Sinjoro, Reganto de la Tero!
Afabla, Kompata Dio sonĝis,
    La Kreinto viziis:
"La ĉielo pluvu oleon,
    la riveroj fluigu mielon!
Por ke mi sciu ke vivas la Potenca Sinjoro,
    ke pluvivas la Sinjoro, Reganto de la Tero."
Afabla, Kompata Dio sonĝis,
    la kreinto viziis:

[11] Aŭ eble, pli ĝenerale, "emon".

La ĉielo pluvis oleon,
    la riveroj fluigis mielon.
Afabla, Kompata Dio ĝojis,
    li metis siajn piedojn sur la apogilon.
Li malfermis siajn makzelojn kaj ridis.
Li elkriis:
“Mi povas sidi ripozante,
    mi povas esti trankvila!
Ĉar vivas la Potenca Sinjoro,
    pluvivas la Sinjoro, Reganto de la Tero.”
Dio vokis Junan Anaton:
    “Aŭskultu, Juna Anat:
Diru al la Suno, la Dia Lumo,
    ke la Potenca Sinjoro nun reviviĝis.
Kie estas la Potenca Sinjoro? Kol. IV:
    Kie estas la Sinjoro, Reganto de la Tero?”
Juna Anat foriris,
    ŝi iris al la Suno, la Dia Lumo.
Ŝi elkriis:
“Jen komuniko de Dio, via Patro, la Virbovo:
    vorto de la Afabla, via Patro:
        La Potenca Sinjoro nun reviviĝis.
Kie estas la Potenca Sinjoro?
    Kie estas la Sinjoro, Reganto de la Tero?”
La Suno, la Dia Lumo, respondis,
        kaj promesis serĉi la Sinjoron, kiu nun revivas. Anat kaj la Suno plu konversaciis. Oni ja retrovis la Sinjoron. La Sinjoro reiris al la Altaĵo Capan. Tie li kaptis kaj mortigis la filojn de Aŝera per batiloj, poste li sidiĝis sur sian tronon.
Unu tago, du tagoj forpasis, Kol. IV:
    tagoj iĝis monatoj,
    monatoj iĝis jaroj.
Post sep jaroj, Dia Morto (*defiis*) la Potencan Sinjoron.
Li elkriis:
“Pro vi mi spertis honton,
    pro vi mi spertis draŝadon, distranĉon.
Pro vi mi spertis ardigon per fajro,
    pro vi mi spertis mueladon per muelŝtonoj.

Pro vi mi spertis (?),
    pro vi mi spertis plantiĝon en la kampoj.
Pro vi mi spertis plantiĝon en la maro!”

La Sinjoro kaj Morto disputis; la disputo iĝis baraktado, kaj dum kelka tempo ili vigle baraktis, sed ambaŭ ŝajnis egale fortaj:

Morto estis forta, Kol. VI:
    la Sinjoro estis forta;
ili pikis kiel virbovoj:
Morto estis forta,
    la Sinjoro estis forta.
Ili mordis kiel serpentoj:
Morto estis forta,
    la Sinjoro estis forta.
Ili piedfrapis kiel ĉevaloj:
Morto falis,
    la Sinjoro falis sur lin.
La Suno kriis al Morto:
“Aŭskultu, Dia Morto!
    Kial vi baraktas kontraŭ la Potenca Sinjoro?
Dio, via Patro, la Virbovo vin aŭdos,
    li forprenos vian tronapogilon!
Li renversos vian reĝan tronon,
    li disrompos vian sceptron!”
Dia Morto ektimis,
    la Favorato de Dio, Morto, teruriĝis aŭdante ŝin.

Kaj Morto cedis. La Suno ricevis taskon kontroli kaj gardi la mortintajn spiritojn.

Ekstraj tekstoj

Pluraj tekstoj troviĝas en la Ugarita tabuletaro, kiuj apartenas al la poemo, sed kies enhavo estas tro detruita kaj tial ne plu estas deĉifrebla. En unu teksto (Gordon, U.T., teksto 75 = BH) ni legas sufiĉe por informiĝi ke Dio ordonis al du sklavinoj, Tuliŝa, sklavino de Luno, kaj D-m-g-j, sklavino de Aŝera, ke ili iru en la dezerton, kie ili nasku “vorantojn” kies vizaĝoj estas bovaj. Tie vidas ilin la Sinjoro kaj amoras ilin. Sed nenio pli estas deĉifrebla.

Parto de alia teksto (Gordon, U.T., teksto 76 = IV AB) estas parte legebla en sia dua kolumno, kaj la teksto helpas iomete pri la koncerna poemo:

La servistoj de la Sinjoro respondis:
“Jen la Sinjoro en sia domo,
    Dia Hadad en sia palaco.
Li prenis sian pafarkon per la manoj,
    siajn sagojn per la mano.
Nun li iras,
    celante la kampon Ŝ-m-k-, kie abundas bovoj.”
Juna Anat ekflugis,
    ŝi ekflugis kaj rapidis,
Al la kampo Ŝ-m-k-, kie abundas bovoj.
La Potenca Sinjoro levis siajn okulojn,
    li levis siajn okulojn kaj rigardis,
Rigardis Junan Anaton,
    la plej belan fratinon de la Sinjoro.
Li marŝis al ŝi, li haltis,
    li klinis sin antaŭ ŝiaj piedoj.
Li elkriis:
    “Saluton, fratino…”

La sekvantaj linioj ne estas tradukeblaj. Sed en la tria kolumno ni legas:

Ŝi naskis bovidon por la Sinjoro,
    virboveton por la Nub-Rajdanto.

Kaj poste

Plorante, ŝi iris al A-r-r-,
    al A-r-r-, kaj al Capan,
Al bela Monto Venko.
    Ŝi parolis al la Sinjoro:
“Aŭskultu ĝojigan informon, Sinjoro,
    Filo de Greno, aŭdu!
Bovido naskiĝis per la Sinjoro,
    virboveto per la Nub-Rajdanto!”
La Potenca Sinjoro ĝojis.

En alia teksto (Gordon, G.T., teksto 129 = III AB,C), ni legas fragmentojn de rakonto kiu eble estis parto de la komenco de la poemo Baal kaj Anat. La teksto ne estas sufiĉe certa por ebligi

tradukon, sed ŝajnas roli en ĝi Venuso, Maro, kaj la Suno. Venuso kaj la Suno baraktadas, kaj la Suno pacigas ilin, uzante la samajn vortojn kiel dum la baraktado de Morto kaj la Sinjoro. Ankaŭ tie la kaŭzo de la disputo ŝajnas esti palaco, kiun volas konstruigi Maro.

Kelkaj aludoj en la Biblio

Baal, kaj "la Baaloj" estis tre ofte menciataj en la Biblio. Baal ("La Sinjoro", en nia traduko de la Ugarita poemo) estis la plej grava dio Palestina, kvankam nur filo de la Potenca Dio, la Patro, la Kreinto, la Afabla, la Kompata.

Nur kelkaj aludoj al la poemo pri Baal kaj Anat troveblas en la Biblio, kaj ĉiuokaze ili estis reformitaj kaj aplikitaj al Javeo (la nomo de Dio en la Hebreaj tradiciaj tekstoj). Jen novaj tradukoj de ĉiuj el la sekvantaj tekstoj:

Psalmo 74:13-15

Vi detruis Morton, per via potenco,
vi rompis la kapojn de la monstroj sur la akvo.
Vi rompis la kapojn de Lotan,
vi elmetis lin kiel manĝaĵon por la demonoj.
Vi fendis la fonton kaj kurenton,
vi sekigis la ĉiamfluajn riverojn.

Psalmo 89:10-13 (en tradukoj, 89:9-12)

Vi regas la arogantan Maron,
kiam ĝi levas siajn ondojn, vi silentigas ilin.
Vi disrompis Rahabon, kiel por mortigi,
per via potenca brako vi disigis viajn malamikojn.
Via estas la ĉielo,
via estas la tero,
vi faris la fundamenton por la tero kaj ĝia enhavo.
Vi kreis Capanon kaj Jaminon,
Tabor kaj Ĥermon krias pro via nomo.

Psalmo 104:13-15

Jen la granda Maro, tre vasta,
jen la nekalkuleblaj rampobestoj,
etaj kaj grandaj.
Jen iras la ŝipoj,
kaj Lotan, kiun vi kreis kiel ludilon.

Ijob 3:8

Malbenu ĝin, homoj malbenantaj Tagon,
pretaj veki Lotanon.

Ijob 26:7

Vi etendis Capanon super la abismon,
vi pendigis la teron super la vakuon.

Ijob 26:12-13

Per sia potenco li silentigis la Maron,
per sia scio li detruiis Rahabon.
Per sia vento li poluris la ĉielon,
lia mano mortigis la malbonan Serpenton.

Ijob 40:15

Vi eltiris Lotanon per fiŝhoko,
vi ligis lian langon per ŝnuro.

Jesaja 27:1

Tiam Javeo sendis punon per sia granda, solida, potenca glavo
al Lotan, la malbona Serpento,
al Lotan, la tordiĝanta Serpento,
li mortigis la monstron de la Maro.

Jesaja 51:9-10 (En ĉi tiu teksto la verkinto ligas la poemaludon al la savo de la Hebreoj el Egiptio.)

Vekiĝu, Vekiĝu, armu vin!
Brako de Javeo, vekiĝu kiel antikve,
kiel dum la pasinta tempo!
Ĉu vi ne dishakis Rahabon,
mortigis la monstron?

Ĉu vi ne sekigis Maron,
akvon de granda Oceano?
Kiu faris vojon el la marvaloj
por ke suriru ilin la savitoj?

Krt

Krt[12] akiras edzinon

(Gordon, U.T., teksto: Krt)

Pereis la familio de la reĝo,
    sep fratoj,
    ok kunnaskitoj.
Mortis la filoj de Krt,
    detruiĝis la hejmo de Krt.
Li trovis sian destinitan edzinon,
    sian ĝustan edzinigiton,
Sed la iama edzino nun ne plu vivis.
    Li havis parencojn, sed
Triono mortis, kiel virbovoj,
    kvaronon mortis pro malsanoj,
Kvinonon forprenis epidemioj,
    sesono mortis, dronis en la maro,
    sepono mortis dum batalado.
Krt vidis la morton de siaj filoj,
    Krt vidis la pereon de siaj filoj,
Lia hejmo estis detruita.
    lia hejmo pereis plene,
    sen heredonto.
Li eniris sian ĉambron por plori,
    verŝante larmojn li murmuris.
Liaj larmoj falis sur la teron kvazaŭ sikloj,
    sur lian liton kvazaŭ moneroj dum li ploradis.
Li endormiĝis larme,
    dormo kovris lin.
Dum li dormis li ektremis,
    ĉar Dio venis al li dum lia sonĝo,
    la Patro de la Homaro dum lia vizio.
Li proksimiĝis kaj demandis al Krt:
"Kial Krt ploras?
    Kial larmas la nobla infano de Dio?

[12] Kutime oni transskribas ĉi tiun nomon *Keret*. Povas esti ke *Krt* estis la eponomia [tradicia nomdoninta] prapatro de la popolo de Kreto, kaj la transskribo eble estu **Kretu*.

Ĉu li volas suverenecon kiel tiun de lia Patro, la Virbovo?
Regnon kiel tiun de la Patro de la Homaro?…”
Dio plu volas scii kion deziras Krt: ĉu eble monon? Sklavojn kaj ĉevalojn? Krt respondas: nur infanojn. Dio plu parolis al li,
Dum Krt ploris,
dum la nobla infano de Dio larmis:
“Lavu vin, ruĝe pudru vin,
lavu vin de la manoj ĝis la kubutoj,
de la fingroj ĝis la ŝultroj.
Eniru la ombron de la tendo,
prenu ŝafidon per la manoj,
Oferotan ŝafidon per la mano,
junan ŝafidon per ambaŭ manoj,
Oferu birdon ankaŭ,
elprenu la intestojn de oferota birdo,
Elverŝu vinon per arĝenta taso,
mielon per ora taso.
Iru al la supro de la turo,
sidu sur la rando de la muroj.
Etendu viajn manojn ĉielen,
oferu al Dio, via Patro, la Virbovo.
Oferu al la Sinjoro,
donu manĝon al la Filo de Greno.
Poste, Krt, revenu de la tegmento,
preparu manĝon por la urbo,
tritikon por B-t-H-b-r-.
Baku panon sufiĉan por kvin monatoj,
panbulojn sufiĉajn por ses monatoj,
Preparu provianton por ke oni povu marŝi,
provizu la armeon por ke ĝi povu marŝi.
Provizu vian armeon,
grandan armeon,
Tri milionojn da viroj,
sennombrajn soldatojn,
Nekalkuleblajn batalantojn,
soldatojn kiuj marŝos milope,
dekmilope.
Po du en vico ili marŝu,
po tri en vico ili iru.

La fraŭlo fermu sian domon,
la vidvino dungu helpanton,
La malsanulo portu sian liton,
la blindulo *(trovu gvidanton.)*
Eĉ la nova edzo devas kuniri,
lasi sian edzinon al alia persono,
sian amatinon al iu alia.
Ili kovru la kampojn kvazaŭ lokustoj,
la randojn de la dezerto kvazaŭ saltinsektoj.
Marŝu unu tagon, du,
tri, kvar tagojn,
Kvin, ses tagojn,
kaj je matenkrepusko de la sepa
Vi atingos Grandan Ud-m-on
kaj Malgrandan Ud-m-on.
Ataku la urbojn,
sieĝu la urbetojn,
Forpelu la lignokolektantojn el la kamparo,
la pajlokolektantojn el la draŝejoj,
Forpelu la virinojn for de la putoj,
la siteloplenigantinojn for de la fontoj.
Poste dum unu tago, du tagoj,
tri, kvar tagoj,
kvin, ses tagoj,
Ne pafu viajn sagojn en la urbon.
ne (*ĵetu*) ŝtonojn per viaj manoj.
Je la matenkrepusko de la sepa tago,
Reĝo P-b-l- ne povos dormi
Pro la muĝado de siaj virbovoj,
pro la sonado de siaj azenoj,
La kriado de siaj bovoj,
la bojado de la birdojn ĉasantaj hundoj.
Li sendos mesaĝistojn:
"Iru al Krt en la *(kampo, kaj diru)*:
Jen komuniko de Reĝo P-b-l-.
Akceptu arĝenton kaj oron
kiel tributon de lia urbo,
eternajn sklavojn,

Kun tri ĉevaloj por ĉaro
el la stalo de la vasalo.
Krt, pace prenu ĉi tiujn donacojn,
kaj foriru, Reĝo, de mia domo,
Krt, foriru de mia kortego.
Ne sieĝu Grandan Ud-m-on,
kaj Malgrandan Ud-m-on.
Ud-m- estis donaco de Dio,
donita de la Patro de la Homaro!"
Sed resendu la mesaĝistojn al li:
Kial mi akceptu arĝenton kaj oron
kiel tributon de lia urbo,
eternajn sklavojn,
Kun tri ĉevaloj por ĉaro
el la stalo de mia vasalo?
Donu al mi tion, kion mi hejme ne havas,
donu al mi la belan knabinon Ĥ-r-j-,
vian plej aĝan filinon,
Kiu estas tiel bela kiel Anat,
tiel bonaspekta kiel Aŝtaratu.
Ŝiaj brovoj estas kiel lazurŝtono,
ŝiaj okuloj kiel alabastraj potoj.
Ĝojigos min vidi ŝiajn brovojn,
mi estos feliĉa rigardante ŝiajn okulojn,
Ĉar Dio donis ŝin al mi dum sonĝo,
la Patro de la Homaro dum vizio.
Ŝi naskos infanojn por Krt,
idaron por la servanto de Dio."
Li lavis sin, ruĝe pudris sin,
li lavis sin de la manoj ĝis la kubutoj,
de la fingroj ĝis la ŝultroj.
Li eniris la ombron de la tendo,
prenis ŝafidon per la manoj,
Oferotan ŝafidon per la mano,
junan ŝafidon per ambaŭ manoj,
Li oferis birdon ankaŭ,
elprenis la intestojn de oferota birdo,
Li elverŝis vinon per arĝenta taso,
mielon per ora taso.

Li iris al la supro de la turo,
    sidis sur la rando de la muroj.
Li etendis siajn manojn ĉielen,
    oferis al Dio, sia Patro, la Virbovo.
Li oferis al la Sinjoro,
    donis manĝon al la Filo de Greno.
Poste, Krt revenis de la tegmento,
    preparis manĝon por la urbo,
    tritikon por B-t-H-b-r-.
Li bakis panon sufiĉan por kvin monatoj,
    panbulojn sufiĉajn por ses monatoj,
Li preparis provianton por ke oni povu marŝi,
    provizis la armeon por ke ĝi povu marŝi.
Li provizis sian armeon,
    grandan armeon,
Tri milionojn da viroj,
    sennombrajn soldatojn,
Nekalkuleblajn batalantojn,
    soldatojn kiuj marŝis milope,
    dekmilope.
Po du en vico ili marŝis,
    po tri en vico ili iris.
La fraŭlo fermis sian domon,
    la vidvino dungis helpanton,
La malsanulo portis sian liton,
    la blindulo *(trovis gvidanton.)*
Eĉ la nova edzo kuniris,
    lasis sian edzinon al alia persono,
    sian amatinon al iu alia.
Ili kovris la kampojn kvazaŭ lokustoj,
    la randojn de la dezerto kvazaŭ saltinsektoj.
Ili marŝis unu tagon, du,
    je la matenkrepusko de la tria tago
Ili venis al la sanktejo de Aŝera de Tiro,
    la Diino de Cidono.
Tie Krt el T' votis:
"Je la vivo de Aŝera de Tiro,
    la Diino de Cidono,

Se mi reportos Ĥ-r-j-on en mian domon,
    se mi venigos la knabinon al mia kortego,
Mi donos duoblon per arĝento pro ŝi,
    trioblon per oro.”
Li marŝis unu tagon, du,
    tri, kvar tagojn,
Je la matenkrepusko de la kvara tago
    li atingis Grandan Ud-m-on
    kaj Malgrandan Ud-m-on.
Li atakis la urbojn,
    sieĝis la urbetojn,
Li forpelis la lignokolektantojn el la kamparo,
    la pajlokolektantojn el la draŝejoj,
Li forpelis la virinojn for de la putoj,
    la siteloplenigantinojn for de la fontoj.
Poste pasis unu tago, du tagoj,
    tri, kvar tagoj,
    kvin, ses tagoj;
Je la matenkrepusko de la sepa tago,
    Reĝo P-b-l- ne povis dormi
Pro la muĝado de siaj virbovoj,
    pro la sonado de siaj azenoj,
La kriado de siaj bovoj,
    la bojado de la birdojn ĉasantaj hundoj.
Reĝo P-b-l- diris al sia edzino:
        (en proksimume 20 ne plu legeblaj linioj, ŝajne Reĝo P-b-l- diskutis la situacion kun sia edzino kaj decidis kapitulaci. Li sendis mesaĝistojn:)
    “al Krt el T’.
Diru al Krt el T’:
    ‘Jen komuniko de Reĝo P-b-l.
Akceptu arĝenton kaj oron
    kiel tributon de lia urbo,
    eternajn sklavojn,
Kun tri ĉevaloj por ĉaro
    el la stalo de la vasalo.
Krt, pace prenu ĉi tiujn donacojn,
Ne sieĝu Grandan Ud-m-on,
    kaj Malgrandan Ud-m-on.

Ud-m- estis donaco de Dio,
donita de la Patro de la Homaro!
Foriru, reĝo, de mia domo,
Krt, foriru de mia kortego.'"
La mesaĝistoj iris al Krt,
kaj kriis:
"Jen komuniko de Reĝo P-b-l-.
'Akceptu arĝenton kaj oron
kiel tributon de lia urbo,
eternajn sklavojn,
Kun tri ĉevaloj por ĉaro
el la stalo de la vasalo.
Krt, pace prenu ĉi tiujn donacojn,
Ne sieĝu Grandan Ud-m-on,
kaj Malgrandan Ud-m-on.
Ud-m- estis donaco de Dio,
donita de la Patro de la Homaro!
Foriru, reĝo, de mia domo,
Krt, foriru de mia kortego.'"
Krt el T' respondis:
"Kial mi akceptu arĝenton kaj oron
kiel tributon de lia urbo,
eternajn sklavojn,
Kun tri ĉevaloj por ĉaro
el la stalo de mia vasalo?
Donu al mi tion, kion mi hejme ne havas,
donu al mi la belan knabinon Ĥ-r-j-,
vian plej aĝan filinon,
Kiu estas tiel bela kiel Anat,
tiel bonaspekta kiel Aŝtaratu.
Ŝiaj brovoj estas kiel lazurŝtono,
ŝiaj okuloj kiel alabastraj potoj.
Ĉar Dio donis ŝin al mi dum sonĝo,
la Patro de la Homaro dum vizio.
Ŝi naskos infanojn por Krt,
idaron por la servanto de Dio."
Tiam reiris la mesaĝistoj,
ili revenis al Reĝo P-b-l-.
Ili anoncis:

“Jen komuniko de Krt el T’,
vorto de la nobla infano de Dio:
Supozeble la mesaĝisto ripetis la vortojn de Reĝo Krt al Reĝo P-b-l-, kaj li, kapitulacinte, donis la petitan filinon al Krt. La sekva teksto estas plejparte nelegebla.

La malsaniĝo de Krt

(Gordon, *U.T.*, teksto 128; nur kol. 2-6 estas parte legeblaj.)

Kvankam havante nur edzinon, Krt ankoraŭ ne havas infanojn. Li apelas al la Sinjoro, kaj la Sinjoro iras al la asembleo de la dioj:

La Potenca Sinjoro diris: Kol. II:
“Bonvolu veni, Afabla,
Kompata Dio, benu Krt-on el T’,
benu la noblan infanon de Dio.”
Dio prenis tason per sia mano,
kalikon per sia dekstra mano,
Kaj Dio benis,
Dio benis Krt-on,
(*benis*) la noblan infanon de Dio:
“La edzino kiun vi prenis, Krt,
la edzino kiun vi portis en vian domon,
la knabino kiun vi portis en vian kortegon,
Naskos por vi sep infanojn,
okfoje ŝi vivigos infanojn…
Ŝi naskos por vi knabon, J-c-b-,
kiu suĉos la lakton de Aŝera,
Li suĉos la mamojn de juna Anat,
la mamnustristinoj de la noblaj dioj.
Dio promesas ke la idaro estos granda; supozeble li mencias la naskiĝon de diversaj filoj, kaj li nomas filinojn naskotajn:
Ŝi gravediĝos kaj naskos…, Kol. III:
Ŝi naskos filinon…,
Ŝi naskos filinon…,
Ŝi naskos filinon…,
Ŝi naskos filinon…,
Ŝi naskos filinon…,
Ŝi naskos filinon….”

La dioj benis kaj foriris,
    la dioj foriris al siaj tendoj,
    la asembleo de dioj hejmeniris.
Ŝi gravediĝis kaj naskis filon por li,
    ŝi gravediĝis kaj naskis filojn por li.
Post sep jaroj
    la filoj de Krt estis kiel promisite,
    kaj ankaŭ la filinoj de Ĥ-r-j-.
Aŝera memoris lian voton,
    la Diino *(pensis pri lia promeso.)*
Ŝi kriis:
"Jen, nun, Krt…
    vi votis…"
        Ĝuste kio okazis, tion ni ne plu povas scii, pro la rompita teksto. Sed Krt malsaniĝis ial, kaj li ordonis oferbankedon por ke la dioj resanigu lin:
Li metis sian piedon sur la apogilon,
    kaj li parolis al sia edzino:
"Aŭskultu, juna Ĥ-r-j-,
Oferu viajn plej grasajn bestojn,
    malfermu potojn da vino.
Invitu miajn sepdek Virbovojn,
    miajn okdek Gazelojn,
La Virbovojn de Granda Ĥ-b-r-,
    kaj de Malgranda Ĥ-b-r-…."
        Kaj li faris aliajn ordonojn.
Juna Ĥ-r-j- obeis,
    ŝi oferis siajn plej grasajn bestojn,
    malfermis potojn da vino.
Ŝi venigis liajn Virbovojn al li,
    venigis liajn Gazelojn al li,
La Virbovojn de Granda Ĥ-b-r-,
    kaj de Malgranda Ĥ-b-r-.
Ili venis al la domo de Krt,
    al lia loĝejo…
(Juna Ĥ-r-j-) metis sian manon en la pelvon,
    Ŝi metis sian tranĉilon en la viandon.
Juna Ĥ-r-j- diris:

“Mi invitis vin por ke vi manĝu kaj trinku
en la ofero de via mastro Krt…”
Ili metis siajn manojn en la pelvon, Kol. V:
ili metis siajn tranĉilojn en la viandon.
Juna Ĥ-r-j- diris:
“Mi invitis vin por ke vi manĝu kaj trinku
(kaj por ke vi petu la diojn ke ili) benu (*Krt-on*).”
Ili ploris pri Krt dum ŝi parolis,
la Virbovoj lamentis la mortanton.
Evidente Krt estis tre malsana, ĉar oni ja diris:
“Krt ne vivos ĝis la kuŝiĝo de la suno,
nia mastro ne ĝisvivos la subiĝon de la suno…”
Ankaŭ la filojn de Krt ŝi venigis al la domo:
Juna Ĥ-r-j- diris: Kol. VI:
“Mi invitis vin por ke vi manĝu kaj trinku
en la ofero de via mastro Krt.”
Ili venis al Krt.
Kiel parolis la Virbovoj, tiel parolis ankaŭ ili:
“Patro, kiel hundo *via (vizaĝo)* ŝanĝiĝis Gordon: teksto 125
kiel hundo via (aspekto aliiĝis).
Patro, ĉu ankaŭ vi mortos kiel homo?…
Patro, la altaĵo Capan *(lamentas vin)*:
patro, monto Capan de la Sinjoro ploras pro vi!
Kiel povas esti dirite ke Krt estas la infano de Dio,
ido de la Sankta Kompatemulo?”
Nun alia filo venis:
Li venis al sia patro,
plorante kaj grincante per la dentoj.
Larmoplene li kriis:
“Patro, ni ĝojis pro via vivo,
ni estis feliĉaj pro via malproksimeco de la morto.
Patro, kiel hundo via (*vizaĝo*) ŝanĝiĝis
kiel hundo via *(aspekto aliiĝis)*.
Patro, ĉu ankaŭ vi mortos kiel homo?…
Patro, la altaĵo Capan *(lamentas vin*):
patro, monto Capan de la Sinjoro ploras pro vi!
Kiel povas esti dirite ke Krt estas la infano de Dio,
ido de la Sankta Kompatemulo?

Ĉu dioj mortas?
Ĉu la infano de la Kompatemulo ne nepre vivu?"
Krt el T' respondis:
"Mia filo, ne ploru,
ne verŝu larmojn pro mi.
Mia filo, ne detruu la putojn en viaj okuloj
kaj la cerbon en via kapo per larmoj.
Ne alvoku vian fratinon T-t-m-nat…
Ŝi ne venu kaj verŝu larmojn pro mi.
Mia filo, ne informu vian fratinon,
(mia infano) ne sciigu al via fratino,
Por ke ŝi ne elverŝu sian sangon sur la kamparon pro kompato,
ne elverŝu sian animon sur la kampojn.
Kiam Sinjorino Suno kuŝiĝos
kaj Sinjorino Lumo brilos,
Diru al via fratino T-t-m-nat:
Nia Krt faras oferon,
nia Reĝo faras drinkoferon.
Ankaŭ vi devas preni (*tason*) per via mano,
(vi devas preni kalikon) per via dekstra mano,
Kaj iri al la altaĵo de via Sinjoro,
portu *(al li vian peton)*;
kion ajn vi petos
li aprobos, ĉion."
Sekve la knabo Ilĥu
prenis sian lancon per sia mano,
sian armilon per la dekstra mano.
Li komencis kuri al ŝi.
Kiam la knabo atingis ŝin,
lia fratino estis elirinta por ĉerpi akvon.

La fratino ne atendis raporton sed tuj divenis ke Reĝo Krt estas malsana. Do Ilĥu informis ŝin pri la detaloj kaj petis ke ŝi venu al la ofero.

Ŝi venis al sia frato:
"Kial vi rifuzas informi min?
Jam kiom da tempo estas Krt malsana?"
La knabo Ilĥu respondis:
"Li jam de tri monatoj estas malsana,
li estas malsana jam de kvar."

Do nun la knabino iris al sia patro Krt kaj diris la samajn vortojn, kiujn antaŭe diris ŝiaj fratoj:

Larmoplene ŝi kriis:
"Patro, ni ĝojis pro via vivo,
ni estis feliĉaj pro via malproksimeco de la morto.
Patro, kiel hundo via (*vizaĝo*) ŝanĝiĝis
kiel hundo via (*aspekto aliiĝis*).
Patro, ĉu ankaŭ vi mortos kiel homo?…
Patro, la altaĵo Capan *(lamentas vin)*:
Ĉu dioj mortas?
Ĉu la infano de la Kompatemulo ne nepre vivu?"
Patro, monto Capan de la Sinjoro ploras pro vi!
Kiel povas esti dirite ke Krt estas la infano de Dio,
ido de la Sankta Kompatemulo?"

La resaniĝo de Krt

(Gordon, *U.T.*, tekstoj 126 kaj 127.)

Granda parto de la rakonto nun estas perdita. Kiam la teksto rekomenciĝas, ŝajnas ke ni legas pri agronomia katastrofo:

…la pluvo de la Sinjoro sur la teron, Teksto 126, Kol. III:
la pluvo de la Potenculo sur la kampojn.
Ĉar la tero ŝatas la pluvon de la Sinjoro,
la pluvo de la Potenculo plaĉas la kampojn…
La plugistoj levis siajn kapojn,
la farmistoj rigardis supren.
Eluzita jam estis la greno,
la manĝprovizoj en la potoj estis plenuzitaj.
La vino en la vinpotoj estis plenuzita,
la oleo en *la olepotoj estis plenuzita.*

En la dia asembleo Dio aŭdis la lamentojn kaj vidis la mizeron sur la tero. Li do serĉis asembleanon kiu bonvolos resanigi Krt-on. Unue li ordonis:

"Alvoku la dian ĉarpentiston Ilŝu, Kol. IV:
kun liaj diaj ĉarpentistaj edzinoj…"
Li alvokis la dian ĉarpentiston Ilŝu,
Ilŝun, la arkitekton de la domo de la Sinjoro,
kun liaj diaj ĉarpentistaj edzinoj.
Afabla, Kompata Dio diris:

“Aŭskultu, dia ĉarpentisto Ilŝu,
Ilŝu, la arkitekto de la domo de la Sinjoro,
kun viaj diaj ĉarpentistaj edzinoj.”
Sed Ilŝu rifuzis la komision.
Duan fojon Dio (*vokis*),
trian fojon Afabla, Kompata Dio:
“Kiu inter la dioj elpelos la malsanon,
kiu forsendos la malsanon?”
Neniu dio respondis al li.
Kvaran fojon li demandis:
“Kiu inter la dioj elpelos la malsanon,
kiu forsendos la malsanon?”
Neniu dio respondis al li.
Kvinan fojon li demandis:
“Kiu inter la dioj elpelos la malsanon,
kiu forsendos la malsanon?”
Neniu dio respondis al li.
Sesan kaj sepan fojojn li demandis:
“Kiu inter la dioj elpelos la malsanon,
kiu forsendos la malsanon?”
Neniu dio respondis al li.
Tiam diris Afabla, Kompata Dio:
“Sidu sur viaj seĝoj, miaj infanoj,
sidu sur viaj tronoj.
Mi mem faros la sorĉon
por detrui la malsanon.
Mi forsendos la malsanon.”
Por efektivigi ĉi tion Dio elektis Forigantinon:
“Morto, nun pleniĝu per timo! Teksto 127:
Forigantino, nun vi venku!”
Forigantino iris al la domo de Krt,
ŝi veturis
kaj atingis la palacon kie Krt kuŝis malsana.
(Ŝi forviŝis) la malsanon de lia kapo,
denove, ŝi forlavis la ŝviton de lia korpo.
Ŝi ekscitis lian apetiton por manĝado,
por ke li manĝu.
Nun Morto pleniĝis per timo,
Nun Forigantino venkis.

Krt el T' ordonis,
    li kriis:
"Aŭskultu, juna Ĥ-r-j-! Kuiru ŝafidon por ke mi manĝu,
    ŝafon per kiu mi nutros min."
Juna Ĥ-r-j- obeis.
Ŝi kuiris ŝafidon por ke li manĝu,
    ŝafon per kiu li nutru sin.
Dum unu tago, dua tago,
    Krt sidis en sia tronĉambro,
Li sidis sur sia reĝa trono,
    sur sia imperia seĝo.
Ankaŭ J-c-b- sidis en la palaco,
    liaj pensoj diris al li:
"J-c-b-, iru al via patro,
    iru al via patro kaj diru,
Diru al Krt el T':
    Aŭskultu! Atentu!
Vi regas, vi direktas la montojn,
    sed nun viaj manoj ne plu agadas.
Vi ne plu juĝas por la vidvinoj,
    vi ne plu subtenas la rajtojn de mizeruloj.
Ĉar vi estas katenita al la lito,
    ĉar malsano regas vin,
Forlasu la reĝecon. Mi regos vian regnon,
    mi sidos sur via trono."
La knabo J-c-b- iris al sia patro,
    li iris al li kaj kriis:
"Aŭskultu, Krt el T'!
    Aŭskultu! Atentu!
Vi regas, vi direktas la montojn,
    sed nun viaj manoj ne plu agadas.
Vi ne plu juĝas por la vidvinoj,
    vi ne plu subtenas la rajtojn de mizeruloj,
    vi ne plu forpelas ekspluatantojn de malriĉuloj,
Vi ne plu donas manĝon al la orfoj kiujn vi vidas,
    nek al la vidvinoj kiujn vi ne vidas.
Ĉar vi estas katenita al la lito,
    ĉar malsano regas vin,

Forlasu la reĝecon. Mi regos vian regnon,
    mi sidos sur via trono."
Krt el T' respondis: "Mia filo,
    Ĥ-r-n- vin frakasu!
    Ĥ-r-n- frakasu vian kranion!
Aŝtarte-Nomo-de-Baal frakasu vian kranion,
    viaj dentoj elfalu en Biblo!…"

Sekvas nun la nomoj de la skribisto kaj de la diktinta recitisto, la kutima indiko ke la rakonto nun finiĝis.



Dio sidas sur sia trono, dum adoranto prezentas oferon

Aqht

Ĉi tiu tria teksto estas nur parte trovita, kaj fari konjektojn pri ĝia karaktero estas, sekve, nerekomendinde. Multrilate ĝi paralelas la eposon pri Baal kaj Anat, ne nur laŭ karaktero sed ankaŭ laŭ la vortenhavo. Du marĝeninstrukcioj mencias ke la deklamanto nun devas paroli pri tiu kaj tiu afero. Verŝajne tio indikas ke malplena spaco estis enmetita por ke la diktisto, aŭ alia recitisto, enmetu mankantajn scentojn, kiuj poste ja estis enmetitaj.

La signifo de multaj frazoj en la testo estas tre necerta kaj pridisputebla. Ĉar ili estas gravaj por la koncepto kiun ricevas la leganto, la signifo de la tuta rakonto estas neklara. Speciale atentenda estas ĉi tiu stranga fakto: en la skribsistemo de la Ugarita lingvo la vortoj "ja" kaj "ne" estis skribitaj idente. Sekve, preskaŭ ĉiu negativa frazo estas, laŭteorie, tradukebla afirmative se la kunteksto permesas. En parto 3AQ Obv. staras la linio (post la minaco de Anat ke ŝi murdos Aqhton):

Mi ne lasos lin vivi.

Multaj tradukantoj preferas traduki tiel:

Tamen mi revivigos lin.

La verbo permesas ambaŭ tradukojn. Ĉu la Ugarita vorto l antaŭ tiu verbo estu tradukita "ne" aŭ "ja" (= tamen)?

Surbaze de la dua interpreto, multaj komentistoj diras ke Anat nur volis senkonsciigi Aqhton, sian "fraton", kaj ke ŝi planis revivigi lin poste, kaj ke verŝajne la mankanta fino de la rakonto informis pri tiu revivigo. Ŝajnas al mi ke tiu interpreto estas ne verŝajna, kiam ni konsideras la karakteron de Anat en la kunteksto.

Multaj tradukistoj vokalumas la nomon Aqht: Aqhat. La litero q reprezentas Ugaritan sonon kiu ne ekzistas en la modernaj Eŭropaj lingvoj, do ankaŭ ne en Esperanto. Por faciligi voĉlegadon, oni povas prononci: Akat (akcentu la duan silabon), sed tiu prononco ne vere similas al la originalo.

Pri la nomo Dnil mi deziras speciale atentigi. Kiam la Ugarita teksto de Aqht unue aperis, oni tuj rimarkis la similecon de tiu

nomo al la Biblia nomo Daniel. En la Biblia libro Jeĥezkel, ni legas:

> Kaj se meze de ĝi troviĝus tiaj homoj kiaj Noa, Daniel kaj Ijob, ili pro sia virteco savus sian vivon. *(Jeĥezkel 14:214; simila teksto en 14:20),*

kaj:

> kvazaŭ vi estus pli saĝa ol Daniel kaj nenio estus kaŝita antaŭ vi *(Jeĥezkel 28:3).*

Estas ne verŝajne ke tiu "Daniel" estas la Daniel de la Biblia libro nomita Daniel, parte pro la karakterizo, parte pro kronologia problemo, kaj parte ĉar la Hebrea teksto literumas la nomon Daniel en Jeĥezkel iomete malsimile al tiu de la libro Daniel. Sed la Jeĥezkela "Daniel" estas literumita idente al la Ugarita "Dnil". Pro tio, povas esti ke ni devus reestabli la mankantan vokalon en la radiko de la Ugarita nomo kaj transskribi: Danilu. Tamen, kvankam la lingvistika identigo eble estas valida, neniu klara simileco eksiztas inter la karaktero de Danilu en la Ugarita teksto kaj la Daniel en la mencioj en Ĵeĥezkel.

R-p-'-, la prahejmo de Danilu, en la teksto Aqht, estigis multajn komentojn. En la Biblio ni trovas plurfoje la vorton rp'-jm, kiu supozeble estas la pluralo de rp'. Oni vokalumas: rfa-im. Tiu vorto havas diversajn ne tute klarajn signifojn kaj tradukojn en kaj la Ugaritaj kaj la Hebreaj tekstoj.

Li manĝigis la diojn, 2AQ Kol. I:
    li trinkigis la sanktulojn.
Li kuŝis sur sia lito.
Dum unu tago, du tagoj,
    Danilu manĝigis la diojn,
    elverŝis trinkoferojn por la sanktuloj.
Dum tria tago, kvara,
    Danilu manĝigis la diojn,
    elverŝis trinkoferojn por la sanktuloj.
Dum kvina tago, sesa, sepa,
    Danilu manĝigis la diojn,
    elverŝis trinkoferojn por la sanktuloj.

Danilu kuŝis,
Danilu kuŝis sur sia lito
dum la nokto.
Dum la sepa tago
la Sinjoro venis kun la pledo:
“Danilu, la viro el R-p-’- estas mizera,
la heroo el H-r-n-m- estas malfeliĉa,
Ĉar li ne havas infanon kiel liaj fratoj,
neniun idaron kiel liaj kunnaskitoj.
Li tute ne havas infanon kiel liaj fratoj,
tute neniun idon kiel liaj kunnaskitoj.
Li manĝigas la diojn,
li elverŝas trinkoferojn por la sanktuloj.
Benu lin, mia Patro, Dio, la Virbovo;
kompatu lin, Kreinto.
Estu filo en lia domo,
ido en lia palaco,
Kiu starigos monumenton por (*li*),
(*memorigon*) de lia popolo, en la templo.
kiu faros la necesajn aranĝojn por li post lia morto, laŭ la religiaj kutimoj.
Kiu prenos lian manon kiam li estos ebria,
por porti lin kiam vino superfortis lin;
Kiu manĝos por li en la Domo de la Sinjoro,
kiu ofermanĝos en la templo;
Kiu metos argilon sur lian tegmenton kiam eble;
kiu lavos liajn vestojn kiam (*necese*).”
Dio akceptis sian servanton,
li benis Danilun, la viro el R-p-’-,
li kompatis la heroon el H-r-n-m-.
“Estu vivo en la korpo de Danilo, la viro el R-p-’-,
en la animo de la heroo el H-r-n-m-.
Li prosperu,
li enlitiĝu,
Inter kisoj lia edzino gravediĝos,
inter amprenoj ŝi ekkoncipos,
Poste ŝi naskos,
vivigos infanon por la viro el R-p-’-.

Estos filo en lia domo,
ido en lia palaco,
Kiu starigos monumenton por (*li*),
(*memorigon*) de lia popolo, en la templo,
kaj fari la necesajn aranĝojn por li post lia morto, laŭ la religiaj kutimoj.
Kiu manĝos por vi en la Domo de la Sinjoro,
kiu ofermanĝos en la templo,
Kiu prenos vian manon kiam vi estos ebria, Kol. II:
por porti vin kiam vino superfortis vin,
Kiu metos argilon sur vian tegmenton kiam eble;
kiu lavos viajn vestojn kiam (*necese*).”
Danilu ridetis, li briletis,
limalfermis siajn lipojn kaj ridis.
Li metis siajn piedojn sur la apogilon kaj diris:
“Nun mi povas side ripozante,
mi povas esti trankvila,
Ĉar mi havos infanon kiel miaj fratoj,
idon kiel miaj kunnaskitoj,
Kiu starigos monumenton por (*mi*),
(*memorigon*) de mia popolo, en la templo,
Kiu faros la necesajn aranĝojn por mi post lia morto, laŭ la religiaj kutimoj.
Kiu prenos mian manon kiam mi estos ebria,
por porti mn kiam vino superfortis min;
Kiu manĝos por mi en la Domo de la Sinjoro,
kiu ofermanĝos en la templo,
Kiu metos argilon sur mian tegmenton kiam eble,
kiu lavos miajn vestojn kiam (*necese*).”
Danilu hejmeniris,
Danilu atingis sian palacon.
La Kantistinoj, la Filinoj de Kantado, venis,
la Hirundoj.
Danilo, la viro el R-p-’-,
la heroo el H-r-n-m-,
kuiris bovon por la Kantistinoj,
li manĝigis la Kantistinojn,
Li trinkigis la Filinojn de Kantado,
la Hirundojn.

Dum unu tago, du tagoj, li manĝigis la Kantistinojn,
    li trinkigis la Filinojn de Kantado, la Hirundojn.
Dum tria tago, kvara tago, li manĝigis la Kantistinojn,
    li trinkigis la Filinojn de Kantado, la Hirundojn.
Dum kvina tago, sesa tago, li manĝigis la Kantistinojn,
    li trinkigis la Filinojn de Kantado, la Hirundojn.
Dum la sepa tago la Kantistinoj foriris el lia domo,
    la Filinoj de Kantado, la Hirundoj.

Mankas granda kvanto da teksto. Kiam la rakonto rekomenciĝas, ni trovas ke la promesita filo jam naskiĝis. La dia ĉarpentisto, Muziko-kaj-Memoro, promesas donacon al Danilu.

"Mi alportos pafarkon, Kol. V:
    mi venigos pafarkon."
Post sep tagoj, Danilo, la viro el R-p-'-,
    la heroo el H-r-n-m-,
Sidis en la Pordego,
    inter la gravuloj ĉe la draŝejo.
Li juĝis por vidvinoj,
    li verdiktis por orfoj.
Suprenrigardante, li vidis Muzikon veni al li,
    atentante, li vidis Memoron alproksimiĝi.
Li portadis pafarkon,
    li venigadis pafarkon.
Do Danilo, la viro el R-p-'-,
    la heroo el H-r-n-m-, diris al sia edzino:
"Aŭskultu, D-n-t-j-, knabino!
Kuiru ŝafidon el la grego, por manĝigi Muzikon-kaj-Memoron,
    por satigi H-j-n-la-Metiiston.
Manĝigu la diojn, trinkigu ilin,
    servu kaj honoru ilin, la Mastrojn de Dia Egiptio."
La knabino D-n-t-j- obeis:
Ŝi kuiris ŝafidon el la grego, por manĝigi Muzikon-kaj-Memoron,
    por satigi H-j-n-la-Metiiston.
Poste venis Muziko-kaj-Memoro
Kaj metis la pafarkon en la manojn de Danilo,
    metis la pafarkon sur liajn genuojn.
Kaj la knabino D-n-t-j- manĝigis la diojn, trinkigis ilin,
    ŝi servis kaj honoris ilin, la Mastrojn de Dia Egiptio.

Muziko-kaj-Memoro reiris al sia tendo,
H-j-n- reiris al sia hejmo.
Danilo, la viro el R-p-'-,
la heroo el H-r-n-m-,
prenis la pafarkon kaj eniris sian palacon. Li donis la pafarkon al sia filo Aqht. Post kelka tempo, Anat rimarkis la dian pafarkon en la manoj de Aqht, kaj avidis havi ĝin. Unue, ŝi vizitis lin por peti, aŭ postuli, ĝin:

Ŝi kriis: Kol. VI:
"Aŭskultu, juna Aqht,
Se vi petos arĝenton, mi donos ĝin;
se oron, mi transdonos ĝin.
Donu al mi vian pafarkon,
lasu ke la Patrino de Nacioj prenu vian pafarkon."
Juna Aqht respondis:
"Se vi donos potencajn tendenojn el Libano,
fortajn korpoŝnurojn de bubaloj,
Potencajn kornojn de kaproj,
kun bovaj tendenoj…,
Al Muziko-kaj-Memoro, li faros pafarkon por ŝi,
pafarkon por la Patrino de Nacioj."
Juna Anat diris:
"Se vi petos eternan vivon, juna Aqht,
se vi petos eternan vivon,
Mi donos ĝin al vi,
senmortecon mi transdonos al vi.
Mi efektivigos ke vi povu kalkuladi la jarojn kun la Sinjoro,
vi povos nonbradi la monatojn kun la dioj.
Same kiel la Sinjoro senmortigas,
li elverŝas vivon kvazaŭ trinkaĵon,
Li elverŝas ĝin, por ke oni trinku,
li sekrete kantas super ĝi, responde,
Tiel mi mem vivigos, juna Aqht."
Juna Aqht respondis:
"Ne mensogu al mi, knabino,
junulo abomenas viajn mensogojn.
Kia estas la sorto de homo?
Kia rezultiĝas la destino de homo?

Blanka gipso, verŝita sur lian kapon,
gipso sur lian kranion[13].
Ankaŭ mi mortos, kiel ĉiu homo.
Ankaŭ mi mortos.
Krome, mi devas diri ĉi tion:
Pafarkoj estas armiloj por soldatoj.
Ĉu do virinoj nun komencos ĉasadi armite?”
Anat laŭte ridis pri li,
sed sekrete ŝi pensis:
“Rekonsideru, juna Aqht,
rekonsideru!
Mi renkontos vin sur la vojo de peko,
sur la strato de fiereco,
Kaj mi batos vin ĝis miaj piedoj,
vin, la plej fortan, noblan viron!”
Ŝi foriris, rapidis trans la teron,
foriris al Dio ĉe la fontoj de la riveroj,
inter la kurentoj de Oceano.
Ŝi iris al la loĝejo de Dio,
al la Reĝo, la Tre Aĝa Patro.
Ŝi klinis sin antaŭ Dio,
ŝi surteren falis kaj honoris lin.
Ŝi kalumniis pri Aqht, la infano de Danilu,
la viro el R-p-’-.
Juna Anat kriis Teksto 3AQRcv
al Dio ke ŝi volas lian helpon, ke li postulu de Aqht la deziratan pafarkon. Sed Dio rifuzis, kaj Anat minacis lin:
“Mi fluigos sangon sur viaj grizaj haroj,
mi kovros vian grizan barbon per sango.
Tiam venu Aqht por savi vin!
La infano de Danilu por helpi vin kontraŭ la manoj de juna Anat!”
Afabla, Kompata Dio respondis:

[13] Ekzistis kutimo en la Sirio-Palestina regiono, post la morto de gravulo (ekz. la estro de familio), detranĉi lian kapon kaj per gipso aŭ argilo remuldi la vizaĝon sur la kranio, kaj farbi ĝin per vivokoloroj. La kap-portreton tiel faritan oni konservis en la domo, supozeble por garantii la ĉeeston de la spirito de la mortinto. Tiajn kapojn oni plurfoje trovis dum arkeologia fosado en tiu regiono. Similan kutimon oni plu trovas nuntempe inter kelkaj triboj en Nov-Gvineo kaj en Aŭstralio.



Parto de la argilaj tabuletoj kun la teksto de Aqht

"Mi scias, mia filino, ke vi estas ekscitiĝema,
ke sinregon oni ne povas trovi en diino.
Iru, mia aroganta filino,
Prenu tion, kion vi volas,
kion vi deziras…"
Juna Anat ridis.
Poste ŝi ekiris al juna Aqht, rapide.
Juna Anat ridis.
Ŝi elkriis: "Aŭskultu, juna Aqht,
Vi estas mia frato,
mi estas via fratino."
kaj ŝi informis lin ke Dio donis permeson ke ŝi prenu la pafarkon. Ŝi minacis ke Aqht mortos se li rifuzos. Sed Aqht tamen rifuzis. Do Anat iris al sia servisto,
al J-t-p-n-, la servisto de la Sinjorino. Teksto 3AQ Obv
Ŝi diris: "Diru al mi, J-t-p-n-,
(kiu loĝas en) la Urbo de Lamentantoj,
la Lamenturbo de Princo Luno,…"
kaj ŝi petis ke li mortigu Aqht-on por ŝi.
(J-t-p-n- levis) sian kapon,
la servisto de la Sinjorino, J-t-p-n-, respondis:
"Aŭskultu, juna Anat, ĉu vi batos lin nur pro lia pafarko,
pro lia sagarmilo?
Ĉu vi ne lasos lin vivi?…"
Juna Anat respondis:
"Konsideru, J-t-p-n-!
Mi metos vin kiel aglon en mian zonon,
kiel birdon en mian glavingon.
Kiam Aqht sidiĝos por manĝi,
kiam la filo de Danilu komencos nutri sin,
Kiel fumo el lia nazo.
Mi ne lasos lin vivi."[14]
Ŝi prenis J-t-p-n-on, la serviston de la Sinjorino,
ŝi metis lin kiel aglon en sian zonon,
kiel birdon en sian glavingon.
Kiam Aqht sidiĝis por manĝi,
kiam la filo de Danilu komencis nutri sin,

[14] Aŭ "Tamen mi lasos lin vivi." Vidu la komenton pri ĉi tio sur paĝo 55.

La agloj ŝvebis super li,
    grego da birdoj flugis super li.
Inter la agloj ŝvebis Anat,
    ŝi metis lin super Aqht-on.
Li batis lian kapon dufoje,
    lian orelon trifoje.
Dum lia sango elverŝiĝis,
    dum ĝi fluis sur lian genuon,
Lia spiro forlasis lian korpon kiel venteto,
    lia vivo kiel ventoblovo,
Kiel fumo el lia nazo.
Anat, dum ŝia servisto detruis Aqht-on, ploris…:
“Mi batis vin pro via pafarko,
    pro via sagarmilo.
Mi ne lasis vin vivi”…

“Mi batis lin nur pro lia pafarko, Teksto IAQ
    pro lia sagarmilo.
Mi ne lasis lin vivi.
    Sed lia pafarko ne estis donita al mi.”
        Post la morto de Aqht la grenplantoj velkis, kaj neniu rikolto estis farebla.
Danilu, la viro el R-p-’-,
    la heroo el H-r-n-m-,
Eksidis en la Pordego,
    inter la gravuloj ĉe la draŝejo.
Li juĝis por vidvinoj,
    li verdiktis por orfoj.
        Do li rekomencis siajn laborojn. Sed la fratino de Aqht rimarkis ŝanĝojn en la naturo:
Suprenrigardante, ŝi vidis
    ke sekiĝis la greno sur la draŝejo…
Super la domo de ŝia patro ŝvebis agloj,
    flugis grego da birdoj.
La knabino sekrete ploris,
    ŝi kaŝe larmis.
Ŝi disŝiris la vestojn de Danilo, la viro el R-p-’-,
    la vestaĵojn de la heroo el H-r-n-m-.
Danilo, la viro el R-p-’-,
    la heroo el H-r-n-m-,

rimarkis la mankon de
nubo en la varmego,
    nubo, kiu pluvos sur la fruktojn,
    kiu akvigos la vinberojn.
"Dum sep jaroj la Sinjoro afliktos vin,
    dum ok, la Nub-Rajdanto!
Estos nek akvo, nek pluvo,
    nek ondado de la oceano,
    nek la voĉo de la Sinjoro."
Ŝi disŝiris la vestojn de Danilo, la viro el R-p-'-,
    la vestaĵojn de la heroo el H-r-n-m-."
Li parolis al sia filino:
"Aŭskultu, mia filino,
Kiu portas akvon sur la ŝultroj,
    kiu verŝas akvon sur la hordeon,
    kiu konas la vojojn de la steloj:
Selu azenon,
    pretigu rajdbeston,
Surmetu mian arĝentan selon,
    mian oran rajdilon."
La knabino kiu portas akvon sur la ŝultroj,
    kiu verŝas akvon sur la hordeon,
    kiu konas la vojojn de la steloj, obeis.
Plorante ŝi selis azenon,
    plorante ŝi pretigis rajdbeston.
Plorante ŝi helpis lin,
    ŝi metis lin sur la dorson de la azeno,
    sur la belan dorson de la azeno.
Danilu sin turnis kaj vidis planton:
    Li ĉirkaŭpremis kaj kisis ĝin.
"Ho, se nur ĝi povus prosperi en la (kampo)!
    Se nur ĝi povus prosperi inter folioj!
Se nur la mano de juna Aqht povus rikolti vin!
    Se nur lia mano povus meti vin en la grenejon!"
Li turnis sin…,
    li vidis grenplanton en *(la kampo)*,
(*Rimarkinte*) la velkintan grenplanton,
    li ĉirkaŭpremis kaj kisis ĝin:

“Ho, se nur la grenplanto povus prosperi en la (*kampo*)!
Se nur ĝi povus prosperi!…
Se nur la mano de juna Aqht povus rikolti vin!
Se nur lia mano povus meti vin en la grenejon!”
Apenaŭ forlasis lian buŝon la vortoj,
la parolo liajn lipojn,
Kiam li suprenrigardis kaj vidis:
alvenas mesaĝistoj kun raporto pri la morto de Aqht, kiun ili vidis:
Ili venis, ili elkriis:
“Aŭskultu, Danilo, viro el R-p-’-,
Juna Aqht mortis.
Juna Anat faris ke lia spiru forlasu lian korpon kiel venteto,
lia vivo kiel ventoblovo!”
La piedoj de Danilu tremis sub li,
lia dorso agitiĝis,
Lia kapo tremis,
li elkriis:
Li malbenis la murdintinon.
Li elkriis:
“La Sinjoro rompu la flugilojn de la agloj,
la Sinjoro rompu iliajn flugilojn!
Ili falu antaŭ miajn piedojn!
Mi distranĉos ilin por trovi
ĉu en ili estas graso aŭ ostoj.
Kaj mi lamentos kaj enterigos lin,
mi metos lin en la dian tombejon.”
Apenaŭ forlasis lian buŝon la vortoj,
la parolo liajn lipojn,
Kiam la Sinjoro rompis la flugilojn de la agloj,
la Sinjoro rompis iliajn flugilojn,
ili falis antaŭ liajn piedojn.
Li distranĉis ilin sed trovis
neniun grason, neniun oston.
Li elkriis:
“La Sinjoro resanigu la flugilojn de la agloj,
la Sinjoro resanigu iliajn flugilojn!
La agloj flugadu kaj ŝvebadu!”
Dum li elkriadis, li vidis
li rimarkis H-r-q-b-on, la patron de la agloj.

Li elkriis:
“La Sinjoro rompu la flugilojn de H-r-q-b-,
la Sinjoro rompu liajn flugilojn!
Li falu antaŭ miajn piedojn!
Mi distranĉos lin por trovi
ĉu en li estas graso aŭ ostoj.
Kaj mi lamentos kaj enterigos lin,
mi metos lin en la dian tombejon.”
Apenaŭ forlasis lian buŝon la vortoj,
la parolo liajn lipojn,
Kiam la Sinjoro rompis la flugilojn de la H-r-q-b-,
la Sinjoro rompis liajn flugilojn,
li falis antaŭ liajn piedojn.
Li distranĉis lin sed trovis
neniun grason, neniun oston.
Li elkriis:
“La Sinjoro resanigu la flugilojn de la H-r-q-b-,
la Sinjoro resanigu liajn flugilojn!
H-r-q-b- flugadu kaj ŝvebadu!”
Dum li elkriadis li vidis
li rimarkis C-m-l-on, la patrino de la agloj.
Li elkriis:
“La Sinjoro rompu la flugilojn de C-m-l-,
la Sinjoro rompu ŝajn flugilojn!
Ŝi falu antaŭ miajn piedojn!
Mi distranĉos ŝin por trovi
ĉu en ŝi estas graso aŭ ostoj.
Kaj mi lamentos kaj enterigos lin,
mi metos lin en la dian tombejon.”
Apenaŭ forlasis lian buŝon la vortoj,
la parolo liajn lipojn,
Kiam la Sinjoro rompis la flugilojn de la C-m-l-,
la Sinjoro rompis ŝiajn flugilojn,
ŝi falis antaŭ liajn piedojn.
Li distranĉis ŝin kaj trovis
jen estas graso kaj ostoj!
Li elprenis Aqht-on,
plorante li prenis lin kaj enterigis lin,

Li enterigis lin en tombon,
en kadavrejon.
Poste li elkriis:
“La Sinjoro rompu la flugilojn de la agloj,
la Sinjoro rompu iliajn flugilojn,
Se ili flugados super la tombo de mia filo,
se ili vekos lin dum lia dormado!”
La reĝo elkriis:
“Ve al mi, Q-r-m-j-n-!
Sur vi juna Aqht estis murdita!
(Ve) nun kaj por ĉiam,
nun kaj eterne!”
Li eliris la tombejon, portante batilon,
kaj iris al M-r-r-t T-g-l-l- B-n-r-.
Li elkriis:
“Ve al vi, M-r-r-t T-g-l-l- B-n-r-!
Sur vi juna Aqht estis murdita!
Viaj radikoj neniam prosperu en la tero,
via kapo malaltiĝu!
(*Ve*) nun kaj por ĉiam,
nun kaj eterne!”
Li eliris la tombejon, portante batilon…
Marĝena noto en la Ugarita teksto instrukcias ĉi tie: “Nun rakontu pri lia hejmo”.
Danilu iris al sia hejmo,
Danilu reiris al sia palaco.
Plorantaj virinoj eniris lian palacon,
lamentantaj virinoj lian hejmon, P-z-g-m- g-r-.
Li ploris pri juna Aqht,
li ploris pri la infano de Danilo, la viro el R-p-’-.
Post sep jaroj, Danilo, la viro el R-p-’-, diris
la heroo el H-r-n-m- proklamis,
Li elkriis:
“Nun foriru, plorantaj virinoj, el mia palaco;
lamentantaj virinoj, el mia hejmo P-z-g-m- g-r-.”
Li oferis al *(la dioj)* de la ĉielo,
oferon por H-r-n-m-, al la steloj.
Lia filino rimarkis ĉi tion:
La knabino kiu portas akvon sur la ŝultroj diris:

"Patro oferis al la dioj,
li oferis al *(la dioj)* de la ĉielo,
oferon por H-r-n-m-, al la steloj.
Se vi benos min, mi estos beata.
Se vi donos al mi vian benon, mi estos benoplena.
Poste mi mortigos la personon kiu murdis mian fraton,
mi detruos la homon kiu detruis mian kunnaskiton!"
Danilo, la viro el R-p-'-, respondis:
"Refreŝiĝu la vivo de la knabino kiu portas akvon sur la ŝultroj,
kiu verŝas akvon sur la hordeon,
kiu konas la vojojn de la steloj!
Prosperu!
Mortigu la personon kiu murdis vian fraton,
detruu la homon kiu detruis vian kunnaskiton!"
(La knabino) banis sin en la maro,
ŝi ruĝe pudris sin.
Ŝi vestis sin per vestoj de knabo,
ŝi metis *(tranĉilon en sian zonon),*
ŝi metis glavon en sian glavingon.
Super ĉion, ŝi surmetis vestojn de virino.
Kiam la Dia Lumo, la Suno, suben iris,
la knabino atingis la tendojn.
Oni anoncis al J-t-p-n-:
"Nia Mastrino eniris la domon,
venis ĉi tien."
J-t-p-n-, la servisto de la Sinjorino, respondis:
"Prenu vinon, trinkigu min.
Metu tason en mian manon,
kalikon en mian dekstran manon."
J-t-p-n-, la servisto de la Sinjorino, diris:…
"La mano kiu mortigis junan Aqht
povas mortigi milojn da malamikoj…"
Denove li postulis vinon kaj
Denove ŝi prenis vinon kaj trinkigis lin,
ŝi donis vinon al li kaj trinkigis lin.
En la marĝeno instrukcio diras: "Nun rakontu pri la filino."

Ĝis nun neniu alia parto de la teksto estas trovita, tiel ke la fino de la eposo estas nekonata.